

Prezo 7½d. Sd. 30.

WILLIAM BAYLE BERNARD.

Lia Lasta Ŝanco

Komedio en du Aktoj.

EL LA ANGLA LINGVO TRADUKIS

— G E G O . —

LONDON :

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION
(INCORPORATED),

17 HART STREET, W.C.

—
1915.

TRADUKOJ DE GEGO.

Kara Panjo—Komedieto en Unu Akto el Walter Gordon
Prezo 7½d. Sd. 30.

La Kamena Angulo—Familia Dramo en Du Aktoj el H. T.
Craven. Prezo 7½d. Sd. 30.

Lia Lasta Ŝanco—Komedio en Du Aktoj el William Bayle
Bernard. Prezo 7½d. Sd. 30.

Alegorioj el la Naturo el Margaret Gatty. Prezo 6d. Sd. 25.

OPINIOJ DE LA GAZETARO.

KARA PANJO—DE WALTER GORDON—El la Angla Lingvo Tradukita de GEGO. PREZO 7½d. Sd. 30.

British Esperantist.—La traduko estas sprite farita.

Lingvo Internacia.—La Esperanta traduko estas tre bona.

Germana Esperantisto.—Samideanoj, ludu, ludigu kaj aŭskultu ĉie tiun ĉi ne nur bonteman, sed ankaŭ bonstilan kaj sen aparta ilaro ludeblan komedion . . . Entute la lingvo estas efektive bona, kaj la teksto ĉie klara kaj korekta.

Danubo.—La stilo estas tre bona.

LA KAMENA ANGULO—DE H. T. CRAVEN. El la angla lingvo tradukita de GEGO. PREZO 7½d. Sd. 30.

British Esperantist.—Kiam eldonajo de Presa Esperantista Societo sin trovas ĉe ni, estas nia kutimo anticipi ion bonan, kaj tiu ĉi libro kuraĝigas nin teni plu tian kredon. La tradukinto ne nur sukcesis enporti la "atmosferon" de la originalo en nian lingvon, sed samtempe sukcesis pri tio, ke lia esperantajo estas viva kaj fortika.

Lingvo Internacia.—Kiam mi raportis pri la esperantigo de "Kara Panjo," ni trovis okazon laŭdi la rimarkindan lertecon de la tradukinto por la facila komprenebleco de liaj frazoj kaj la natura eleganteco de lia stilo. Hodiaŭ, juĝon ne malpli laŭdan ni devas fari pri freŝe aperinta traduko de la sama aŭtoro, kiu prave kaj sukcese konigis al ni tre interesan kaj emocioplenan ĉefverketon de H. T. Craven "La Kamena Angulo." Ĝi estas komedio tre ludinda en la Esperantista teatraĵaro, kaj inda esti konservita de ĉiuj en la bonaj libroj.

Germana Esperantisto.—Mi ne dubas, ke sentemaj molanimaj fratinoj legos la libron kun vera ĝuo. Mi tion eĉ ne bedaŭras, ĉar el la klara kaj bona stilo de la tradukinto ili povos lerni multan bonon.

Esperanto.—S-ro Gego estas la bonega tradukinto de la amuza komedieto: "Kara Panjo" kaj li rajtus, sen timo de la plej severaj recenzistoj, eldoni senkonsile tute korektajn tradukaĵojn. Tamen li modeste petis siajn kolegojn de Esperantista Literatura Asocio, ke

ili tralegu lian manuskripton kaj helpu lin per siaj konsiloj. Jen pripensinda kaj de kelkaj imitinda ekzemplo!

ALEGORIOJ EL LA NATURO—DE MARGARET GATTY. El la angla lingvo trad. Gego. London, The British Esperanto Association. PREZO 6d. Sd. 25.

Esperanto.—En tiu poezia kaj pensoriĉa verketo, la aŭtorino, ŝajne parolante pri la vivo, morto aŭ aliformiĝoj de papilioj, araneoj, libeloj kaj birdoj, nur alegorie aludas la misterojn de la homaj vivo, morto kaj postmorta reviviĝo. Pri tiaj solvindaj, sed eble nesolveblaj demandoj, ĉiam troviĝos iuj, kiuj dubos kaj timos, ĉiam iuj, kiuj ne kredos (sed ne timos kaj ne mokos), ĉiam iuj, kiuj esperos kaj rigardos supren (vid. p. 26). Sed ĉiuj konsentos pri la delikata ravanteco de la priskriboj de Margaret Gatty. El kvar alegorioj, el kiuj konsistas la verketo (Araneaĵoj, Ne perdita sed foririnta antaŭe, Leciono pri fido, La ĉiutaga pano), eble la dua estas la plej bela.

Larvoj unuj post aliaj libeliĝas, sed nek la larvoj povas komunikiĝi kun la libeloj, nek estas eble, ke la libeloj revenu en la lagan akvon kaj rakontu al la larvoj pri sia nuna enaera vivo. Ili nur povas rondflugi super la lageto, en kiu mallume vivadas iliaj forlasitaj, sed baldaŭ siavice libeliĝontaj fratoj. Tial "en la venta aero ĉirkaŭ la arbara lageto, en la helaj someraj posttagmezoj, sonadas la frapado de la flugiloj de libeloj, kiuj rapidas jen malantaŭen jen antaŭen, jen tiuflanken jen aliflanken, sen turniĝo aŭ halto, super la kristaleca akvo en la raviteco de la nova vivo" (p. 27).

La sekvanta citaĵo el la sama alegorio ankaŭ sciigos pri la ĉarmo de l' originalo kaj pri la klasika eleganteco de la traduko:

"Ho bela arbara lageto plena de mistera vivo, pri kies sekretoj ni scias tiel malmulte, kiu ne volus longe resti apud via bordo por studado kaj pripensado? tie, kie la fago etendas siajn graciajn branĉojn, ĝojante en la reflektita belegeco malsupre; tie, kie la senpekaj birdoj kantas sian ĝojan muzikon; tie, kie la blua miozoto rakontas pri la antikva romaneco kaj la longaj herboj sin klinas super siaj bildsimilaj ombroj; tie, kie la libeloj pendflugadas super la supraĵo de la akvo, sopirante trankviligi la korojn de la tremanta gento, kiu ankoraŭ esperas kaj tremas malsupre" (sama paĝo).

Amerika Esperantisto.—Kvar ĉarmaj alegorioj, plej lerte verkitaj kaj plej lerte tradukitaj. Pro ĝia propra indeco, pro la bonstila Esperanto, la libreto bone taŭgas legadon kaj studadon de mezlerta studento.

Mi deziras esprimi mian koran dankon al tiuj
el miaj kolegoj de Esperantista Literatura Asocio,
kiuj afable tralegis la manuskripton de ĉi tiu verketo
kaj tre helpis min per siaj konsiloj.

LA TRADUKINTO.

WILLIAM BAYLE BERNARD.

LIA LASTA ŜANCO.

KOMEDIO EN DU AKTOJ.

—♦♦♦—
El la angla lingvo tradukis

GEGO.

—♦♦♦—
PREZO : : : $7\frac{1}{2}d.$; *Sd.* 30

LONDON :
THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION
(INCORPORATED),
17, HART STREET, W.C.

—
1915.

PERSONOJ.

Ĉi tiu komedio estis ludita la unuan fojon en "Haymarket" Teatro en Londono la 15an de Oktobro, 1839. La prezentado ordinare okupas unu horon kaj dudek minutojn. La angla originalo estas publikigita sub la titolo "His Last Legs" de Samuel French Limited, Southampton Street, Strand, Londono je prezo de ses pencoj (25 sd.), kaj de Samuel French, 28 West 38th Street, Nov-Jorko.

- FELIKSO O'CALLAGHAN (Oka'lahan). Bankrotinta sinjoro.
KAROLO RIVERS. Filo de Rivers kaj amanto de Julino.
RIVERS. Kampara sinjoro.
DOKTORO JOHANO BANKS. Kuracisto. Patro de Julino.
JOHANO. Servisto de Rivers.
TOMAS. Servisto en lernejo.
SINO. LI'DIO MON'TAGUE. (Montagju). Fratino de Rivers.
Vidvino.
JULINO BANKS. Filino de Doktoro Banks, kaj amatino de Karolo.
SINO. SUZANO BANKS. Edzino de Doktoro Banks, kaj patrino de Julino.
BETI. Servistino de Rivers.

LIA LASTA ŜANCO.

AKTO I.

Sceno I.

Strato en kampara urbo. Ĉe la dua eniro dekstre staras butiko de ĉapelistino, kaj ĉe la dua eniro maldekstre lernejo kun nomplato:

“KLASIKA AKADEMIO DE SINJORO BIRCH.”*

Venas KAROLO RIVERS, SINO. MONTAGUE, FINO. BANKS, dekstre.

KAR.—Nu, onklino, jen estas la butiko de via ĉapelistino. Jen, ŝi rigardetas tra la fenestro, esperante ke ni eniros.

SINO. M.—Nu, do, ĉu vi eniros kun mi?

KAR.—Nu, efektive, . . . mi ja tute ne estas kompetentulo pri ĉapeloj . . .

SINO. M., *al si mem.*—Vi tion diras, por ke vi faru okazon interparoli duope kun Julino. (*al KAROLO*) Nu, bone; vi scias, ke mi ne estas malbonkora; (*al JULINO*) Iru do, Julino kara, iom promeni kune kun sinjoro Rivers, dum mi estos interne. Mi ne restos longe. (*Foriras en la butikon*).

KAR.—La nuna, Julino, estas nia lasta kunpromeno, ĉar la patro tre deziras, ke mi akiru universitatan diplomon. Mi devas reiri al la kolegio hodiaŭ vespere. Vole nevole, mi devas min disigi de vi, kaj daŭrigi la studadon de la greka kaj latina.

JUL.—Por fari min feliĉa, same kiel vian patron.

KAR.—Kiel por fari vin feliĉa?

JUL.—Mi ja loĝas sub lia tegmento, kaj li estas tre bonkora por mi, tial mi ne devas perfidi lian konfidon . . .

KAR.—Ne estas necese fari tion. Ĉu mi ne diris, ke mi sciigos lin pri la tuta afero?

JUL.—Plue, vi devas memori, ke estas ankoraŭ unu persono, kun kiu ni devas konsiliĝi.

* elparolu : *Berté.*

KAR.—Via patrino, kiun vi atendas morgaŭ el Londono ?

JUL.—Sed ŝi restos nur malmulte da tagoj, kaj poste ni iros Francujon.

KAR.—Francujon !

JUL.—Kaj la daŭro de nia foresto ekster Anglujo estas neniel difinita.

KAR.—Kio estas la kaŭzo de tio ?

JUL.—Ĝi rilatas mian kompatindan patron.

KAR.—Efektive ?

JUL.—Vi scias, ke, pro senbaza ĵaluzeco, antaŭ dek jaroj li sin disigis de mia patrino, kaj foriris en la eksterlandon.

KAR.—Mi ja aŭdis pri tio.

JUL.—Lastatempe ni sciigis, ke lia sanstato malboniĝas ; kaj kompreneble, ĉar ni forte deziras repaciĝi kun li, la patrino decidis iri lin serĉi. Poste, se ni sukcesos atingi nian celon . . .

KAR.—Vi faros hejmon ĉe li, kaj edziniĝos kun iu elektita de li.

JUL.—Kompreneble li pretendos voĉon pri mia edziniĝo.

KAR.—Kaj mi estos forĝesita. Mi antaŭvidas ĉion. Se vi nun foriros de mi, ni nepre disiĝos por ĉiam ! Mi jam nun decidis, ke mi ne foriros de la hejmo hodiaŭ vespere.

JUL.—Ne ?

KAR.—Ne. Mi certe ne forveturos antaŭ ol vidi vian patrinon, kaj ricevi de ŝi certigon, ke oni konsideros mian estontan feliĉon.

JUL.—Sed ĉu tio estas ebla ? Via patro estas tiel insistema.

KAR.—Se necese per ruzo.

JUL.—Ruzo ?

KAR.—Jes. Mi ĉiam havas unu rimedon. Vi scias, ke nia estas antikva familio, kaj mi estas sola filo ; pro tio li ĉiam maltrankviliĝas se mi eĉ iom malsaniĝas. Nu, jen kion mi faros. Mi enfalos en malsanon.

JUL.—Vi enfalos en malsanon ?

KAR.—Jes, tuj. Iam mi ofte suferis de kapturino. Nu, irante hejmen mi ricevos tian kapturino. Oni tuj enlitigos min kaj venigos kuraciston.

JUL.—Kaj li malkovros vian ruzon.

KAR.—Ne ; nia kuracisto estas bonulo. Mi enlasos lin en la sekreton. Li konsilos, ke mi ne eliru el mia ĉambrotutan semajnon, kaj en tiu tempo eble mi povos vidi vian patrinon, kaj . . .

JUL.—Mi ne povas esperi, ke tio sukcesos, kaj se oni malkovros . . .

KAR.—Nu, tiuokaze, la patro ne povos plendi. Li deziras, ke mi fariĝu *artium magister*, kaj li konstatos, ke mi jam faris iom da progreso pri unu arto. Jen venas la onklino ! Gardu vin ! Ne eĉ unu vorton !

Revenas SINO. MONTAGUE el la butiko.

SINO. M.—Nu, ĉu vi promenis ?

KAR.—Jes, iom, kaj . . .

SINO. M.—Nu, Julino, kion diris al vi ĉi tiu bela junulo ? Se ĝi estas ia sensencaĵo, ne kredu lin. Li ja estas konata flirtulo.

KAR.—Pardonu, onklino. Miaopinie, flirti estas granda malŝparado de la tempo.

SINO. M.—Ĉu efektive, sinjoro Moralafektulo ? Tamen mi povas ankoraŭ memori, kiamaniere vi malŝparadis la tempon en Cheltenham.*

KAR.—Preskaŭ tiom, kiom vi tiel faris pli antaŭe ; ĉu vi efektive pensas, ke mi neniam aŭdis diri, kiamaniere vi kondukis kun iu sinjoro O'Callaghan.

SINO. M.—Ho, sensencaĵo !

KAR.—Ĝi certe ne estis sensencaĵo tiam, ĉar vi scias, ke vi edziniĝus kun li, se la avo tion estus permesinta.

JUL., *dekstre*.—Kiel ! mi neniam aŭdis diri pri tio !

KAR., *centre*.—Ĉu ne ? Ho, jen la tuta afero . . .

SINO. M.—Ho, Karolo, haltigu la langon, mi petas.

KAR.—Sciu do, ke tiu sinjoro O'Callaghan estis la ĉefa stelo en Cheltenham. Li posedis ĉashundaron kaj ĉevalaron, kaj, kiel pruvo de sia bongusto, li enamiĝis en mian onklinon. Tamen, ŝia patro, dezirante ke ŝi edziniĝu kun iu Skoto,

* Elparolu : *Ĉelt'nam*.

forkondukis ŝin, kaj post nelonge ŝia malŝparema amanto el Irlando, tute elspezinte sian havon . . .

SINO. M.—Transiris en Francujon, kaj baldaŭ poste mortis tie. Jen la tuta historio. (*Dekstre, post la scenejo sonas trumpeto de pasaĝera kaleŝego*). He! Tio estas la Londona kaleŝego. Rapidu, Karolo. Oni atendas la vespermanĝon. Vi scias, ke vi devas ekveturi Kembriĝon je la oka horo.

KAR., *al si mem*.—Ĉu jes, onklino? Ne estu tro certa pri tio. Tamen la rememorigo estas oportuna. Mia malsano devus tuj komenciĝi. Mi montru al ŝi kelke da simptomoj.

SINO. M.—Nu, ne malrapidu. Vi scias, ke malplaĉas al via patro, se oni lin atendigadas. He! Kiel! Kio estas al vi?

KAR., *skuante la kapon*.—Nu, mi apenaŭ scias. Mi sentas ion strangan en la kapo—ian turniĝon.

SINO. M.—Granda ĉielo! Mi esperas, ke ne!

KAR.—Jes, en la kapo ĉio turniĝas. Efektive, ŝajnas kvazaŭ la pumpilo dancas valson kun la kadukulejo.

SINO. M.—Ĉu vi volas eniri ien kaj sidiĝi?

KAR.—Mi preferus iri hejmen, tio estas, se mi povas.

SINO. M.—Iru do malrapide, kaj apogu vin sur mi, Karolo.

KAR.—Dankon, onklino, dankon. Eble mi pli bone fartos baldaŭ. Mi ne dubas, ke ĝis la oka mi jam estos tute sana. (*mallaŭte al JULINO*) Kion vi opinias, Julino?

Ĉiuj eliras maldekstre, KAROLO apogante sin sur SINO. MONTAGUE, kaj ame rigardante JULINON.

DOKTORO BANKS *venas dekstre.*

DRO. B.—Jes, mi certe ne eraras, kvankam jam pasis dek jaroj de kiam ni disiĝis. Tio devas esti ŝi, mia propra dolĉa infano. Nu, kiel atingi mian celon—ŝin disigi de ŝia patrino kaj forkonduki kun mi Francujon. Mi devas agi ne perforte. Mi povas esperi sukceson nur konsentigante ŝin. Feliĉe mi trovis, ke ŝi gastas sola ĉi tie. Mi devas ŝin vidi private, kaj vekti ŝian amon al patro: sed kiamaniere tion fari? Mi bezonas amikon, kiu helpus min—iun, kiu portus al ŝi leteron kaj aranĝus renkonton. (*O'CALLAGHAN audiĝas post la scenejo*).

O'CAL.—Ho, ĉu tiu estas la domo? Dankon, sinjoro.

DRO. B., *al si mem.*—He! Kiu venas? Mia Irlanda kunvojaĝinto!

O'CALLAGHAN *venas dekstre en sinjoraj vestaĵoj trouzitaĵ kaj polvokovritaĵ de veturado.*

O'CAL.—Ĉi tie estas la fino de mia vojaĝo, kaj ĝia celo, (*legante nomplaton*) "Klasika Akademio de Sinjoro Birch."

DRO. B.—Ankoraŭ unu fojon, bonan tagon, sinjoro.

O'CAL.—Ha, sinjoro, via servanto. Ĉu vi intencas veturi pluen, aŭ . . .

DRO. B.—Ne, sinjoro; mi havas ideon resti ĉi tie unu-du tagojn.

O'CAL.—Ĉu efektive? Kiel strange! Mi ankaŭ intencas resti. Mi amas iri ien por pasigi la someron, kaj, pro tio, ke nuntempe Londono fariĝis tro varmega por mi . . .

DRO. B.—Eble vi havas amikojn ĉi tie?

O'CAL.—Jes, mi havas. Unu estas sinjoro, (*rigardante la "Akademion"*) kiu malfermadas siajn pordojn al ĉiuj klasoj.

DRO. B.—Efektive? Gastama sinjoro!

O'CAL.—Jes, sinjoro.

DRO. B.—Ŝajnas al mi, sinjoro, ke iam antaŭe mi havis la plezuron renkonti vin . . . Via nomo, mi pensas, estas . . .

O'CAL.—O'Callaghan, sinjoro. Felikso O'Callaghan el Kilmoni Domego, (*al si mem*) antaŭ kelke da jaroj.

DRO. B.—O'Callaghan! Ĉu vi estas en la militistaro?

O'CAL.—Ne, sinjoro, sed mi iam estis en *The Fleet*.*

DRO. B., *al si mem.*—Mi volus scii, ĉu eble tiu homo helpus min. Li evidente estas malriĉa kaj, mi opinias, bonhumora.

O'CAL., *al si mem.*—En la eksteraĵo de mia amiko estas io, kio ne estas tute legebla. Li estas tro bone vestita por esti ŝtelisto, kaj tro melankolia por esti helpisto de skabeno.†

* La vortludo ne estas tradukebla. *The Fleet* (la militŝiparo) estas ankaŭ la nomo de iama angla malliberejo por ŝulduloj.—Noto de tradukinto.

† Angle: Sheriff—Titolo de la ĉefa plenumisto de la leĝoj sub la direkto de la tribunaloj en anglaj graflandoj.—Noto de tradukinto.

DRO. B.—Sinjoro, mi petas, ke, se vi ne estos okupita alimaniere, vi vespermanĝu kun mi.

O'CAL.—Mi tre dankas vin, sinjoro, sed mi ja estos okupita. Mi venis ĉi tien pri negrava afero, kaj . . .

DRO. B.—La tasko, kiun vi entreprenas, estas . . . ?

O'CAL.—Ne entrepreni taskojn, sed doni taskojn.

DRO. B.—Doni taskojn ?

O'CAL.—Jes, sinjoro. Kredeble vi ne povas konjekti mian profesion ?

DRO. B.—Mi konfesas, sinjoro, ke mi ne povas.

O'CAL.—Kompreneble vi scias la grandan intereson, kiun oni nuntempe sentas pri la edukada temo.

DRO. B.—Jes, sinjoro.

O'CAL.—Nu, sinjoro, sciu, ke, ĉar mi partoprenas la filantropian spiriton de la nuna tempo, mi decidis doni min al la edukado de la junularo, kaj venis ĉi tien por instrui la legadon, skribadon kaj korektan elparoladon al la leviĝanta generacio en tiu templo de Minervo. (*Montrante al la "Akademio."*)

DRO. B.—Mi neniam estus konjektinta tion.

O'CAL.—Kredeble, ke ne, sinjoro. Mi ne dubas, ke mi aspektas kvazaŭ mi pli rilatas al la malleviĝanta generacio ol la leviĝanta.

DRO. B.—Nu, efektive, sinjoro, se estas permesite, ke mi ĝin diru . . .

O'CAL.—Kompreneble, kompreneble. Estas fakto, sinjoro, ke vi vidas antaŭ vi unu el la plej malfeliĉaj diabloj en la mondo. Oni diras, ke iuj homoj naskiĝas sub malbona stelo. Mia stelo, laŭ mia opinio, estas fiksa. Jam de dek du jaroj mi estas la piedpilko de la Fortuno kaj ne ekzistas kota defluilo, en kiun ŝi ne piedfrapis min.

DRO. B.—Mi supozas do, ke iam vi estis bonstata.

O'CAL.—Bonstata, sinjoro ? Mi posedis unu el la plej bonaj bienoj en Irlando. Homo ne povus naskiĝi por ĝui pli kontentigan servadon de aro da komercistoj. Mi havis tajloron, ĉevalluigiston, buĉiston, kaj bakiston, kiuj ne ricevis spesdekon de post la morto de mia avo. Tute neeble

estus sin trovi en pli facilaj cirkonstancoj. Sed, sinjoro, jen la fatalo, kiu superombris min de mia knabeco. Jen unu el tiuj komercistoj decidis morti, kaj jen alia pendigi sin, ĝis fine ili lasis min en stato de mankego. Jes, sinjoro, ili estis tiel kruelaj, ke ili lasis min perlabori mian vivsubtenon, kvankam ili ĝis tiam min kredigis, ke ili provizos min en la daŭro de tuta mia vivo, kaj eĉ enterigos min poste.

DRO. B.—Malbona afero!

O'CAL.—Ĝi certe estis tia, sinjoro. Post tio, mi malaltiĝis ĝis ĝis la malhonoro akiri vivsubtenon per mia propra cerbopovo, kaj, per mia honoro, mi trovis tion pli neprofitdona kapitalo ol Sud-amerikaj obligacioj. Ĉu vi povas kredi, sinjoro, ke mi provis cent diversajn planojn por akiri vivrimedojn, sed neniu el ili sukcesis. Mi malsukcesis, sinjoro, tiel ofte, kiel la plej floranta komercisto. Oni nomas la sorton nekonstanta! Per mia honoro, sinjoro, por mi ĝi estas tiel konstanta, kiel fulmotondro en tropikaj landoj. Jen pruvo, sinjoro. Mi verkis pri almozdonado libron, kiu enigis min en malliberejon. Mi elpensis vapormaŝinon, kiu brogis miajn akciulojn. Mi entreprenis balsalonon en banurbo, kaj tiun jaron la ĥolero ĝin vizitis. Fine, sinjoro, trovinte, ke, kiel greno kunskuata en sako, mi ĉiam pli malaltiĝadis ĉe ĉiu skuo, mi jam decidis ĉesi bataladi kaj retiri min en kvietan kamparan loketon; sed okaze mi ekvidis gazetan anoncon pri lernejo en ĉi tiu vilaĝo . . .

DRO. B.—Kaj vi nun estas ĝia instruisto?

O'CAL.—Jes, sinjoro. La nuna estas epoko de renversiĝoj, kaj vi nun vidas mian. Jen mi, malfeliĉulo, kiu iam difinadis fasonojn por elegantuloj, jam de nun destinita difini kajerajn skribekzemplojn por knaboj.

DRO. B., *al si mem*.—Jen la ĝusta persono por mia afero! (*al O'CALLAGHAN*) Nu, sinjoro, mi kompatas vin pro viaj malsukcesoj. Mi estos feliĉa, se vi favoros min per vizito post kiam vi loĝiĝos. Mi intencas loĝi en la gastejo.

O'CAL.—Sinjoro, mi estos tre feliĉa.

DRO. B.—Jen estas mia karteto. Eble iam vi vizitos Parizon. (*Prezentas vizitkarteton*). Eble mi havos la plezuron vidi vin hodiaŭ vespere. (*al si mem*) Tute la ĝusta homo por mia afero! Li bezonas monon, kaj posedas bonan

parolmanieron. (*Foriras maldekstre.* O'CALLAGHAN *rigardas la karteton*).

O'CAL.—“DOKTORO BANKS, numero 15, Strato Victoire, Parizo.” Tre ĝentila maljunulo. Nu, do, nun mi iru mian novan loĝejon. Unue mi devas ordigi min. Miaj vestoj estas en tre malfortika sanstato, kaj brosi ilin estus tre danĝere. Por ĉi tiu vojaĝo mi devis turni la surtuton la internon eksteren. La pantalonon mi jam renovigis per botelo da “Revivigilo de Skot.” Nu, bone, tio sufiĉas; mi esperas, ke oni ankoraŭ ne finis la vespermangon. La veturado de Londono certe donis al mi apetiton; mi sentas kvazaŭ mi povus bone ekzempligi la belecon de la geologia sistemo—unu tavolo sur alia. (*Frapetas sur la pordo de la “Akademio.”*) Jen mia estonta hejmo. Mi salutas, trifoje vin salutas, antikva konstruaĵo. En viajn trankvilajn ombrojn mi tiel same, kiel la romano de la antikva tempo, retiras min de batalado. Kvazaŭ alia Cincinato mi turnas la dorson kontraŭ la urbon kaj diras: Fortuno, vi Jano, de nun mi spitas vin. (*Servisto malfermas la pordon.* O'CALLAGHAN *eniras*).

JOHANO *kure venas, maldekstre.*

JOHANO.—Jen bela afero! La juna sinjoro ekmalsaniĝis, kaj kuracisto ne estas trovebla. Mi iris al nia ĥirurgo. Li estas for, vokita al Kembriĝo. Kion fari? Nur restas farmaciisto en la vilaĝo. Nu, mi devas kuri al li. Mi devas ne reveni sen helpanto. Ho ve! ĉu iam ajn okazis io tiel malfeliĉa? (*Foriras maldekstre.*)

O'CALLAGHAN *venas el la lernejo. Sekvas lin* TOMAS.

O'CAL.—Mi diras al vi, sinjoro, ke vi eraras—tio ne povas esti.

TOM.—Efektive, sinjoro, ĝi ja estas vera. Nia nova subinstruisto alvenis hieraŭ.

O'CAL.—Sed mi diras al vi, ke *mi* estas tiu subinstruisto. Mi respondis la anoncon kaj akceptis la kondiĉojn.

TOM.—Jes, sinjoro, sed mi pensas, ke mi aŭdis la mastron diri, ke vi ne respondis ĝustatempe; sekve, pro tio, ke la lernejo malfermiĝis hodiaŭ, kaj li ne povis atendi . . .

O'CAL.—Vi do volas diri al mi, ke, veninte ĉi tien

kvindek mejlojn de Londono, mi trovas alian homon en mia loko.

TOM.—Mi vin certigas, sinjoro, ke mi tre bedaŭras . . .

O'CAL.—Bedaŭras, sinjoro !

TOM.—Ĉio estas malkompreniĝo, sinjoro.

O'CAL.—Malkompreniĝo ! Ĝi estas insulto ; kaj se via mastro estas ĝentilulo, kiel li maltimos montri al mi la vizaĝon ĉe la vespermanĝo ?

TOM.—Ĉe la vespermanĝo, sinjoro ?

O'CAL.—Jes, sinjoro. Kiel li ne hontos eĉ inviti min dormi ĉi tie ?

TOM.—Dormi ĉi tie, sinjoro ?

O'CAL.—Jes, sinjoro, kompreneble li havas liton por mi ?

TOM.—Li certe ne havas, sinjoro. Ni ne havas loketon, kien forŝovi librosaketon.

O'CAL.—Kien do mi devas iri ?

TOM.—Vi trovos bonan liton en la gastejo.

O'CAL.—La gastejo, sinjoro ! La diablo forbruligu ĝin ! Ĉu vi prenas min por Krezuso ? Kiu pagos la gastejon ? Mi insistas resti ĉi tie. Kie estas via mastro ?

TOM.—Mi jam diris, ke li estas for, sinjoro.

O'CAL.—Ne hejme !

TOM.—Ne, sinjoro.

O'CAL.—Kien li iris ?

TOM.—Li iris Jorkon, sinjoro, kaj ne revenos ĝis Kristnasko. (*Eniras kaj fermas la pordon*).

O'CAL.—Kia malhumana fripono ! tiel forsendi min per la plej senhonta preteksto, kaj eĉ rifuzi al mi gluton da vespermanĝo ! Mi vetus, ke tiu fripono rabotus silikon por manĝo, kaj farus supon el la deskrapaĵoj. Je mia animo, se nur mi povus lin trovi, mi donus al liaj knaboj ekzemplon de skribado ; mi linius la dorson al li de la nuko ĝis la koksoj per mia bastono, kaj inter la linioj skribus "Fripono" per grandaj literoj. Tiel, do, malgraŭ ĉiuj miaj esperoj kaj klopodoj, ankoraŭ unu fojon mi malsukcesis. Mi ja pensis, ke mi ne povas fali pli malsupren, kiam mi decidis fariĝi azeno inter la kokidoj de tiu fripono. Sed ne, Felikso,

amiko, eĉ tio estis tro bona por vi. Pro la diablo, kion fari? Jen mi estas, en loko de mi nekonata, je la finiĝo de la tago, kun nur okdek sep spesdekoj en la poŝo, la sola restaĵo de la lasta deksesmila monero, kiun mi posedis.

JOHANO *rapide reeniras maldekstre.*

JOHANO, *al si mem, nerimarkante* O'CALLAGHAN'ON.—Kion fari? La farmaciisto estas en lito, malsana de reŭmatismo; neeble lin venigi, eĉ sur portilo. (*Transpaŝas dekstren*).

O'CAL., *al si mem, nerimarkante* JOHANON.—Nur tiom! Ĝi ne sufiĉus pagi la luon de dentpurigilo!

JOHANO, *al si mem.*—Se oni ne venigos kuraciston, li nepre mortos antaŭ la mateno.

O'CAL.—*al si mem.*—Kion oni povus aĉeti por okdek sep spesdekoj?

JOHANO, *al si mem.*—Mi scias, ke la mastro donus mil spesmilojn.

O'CAL., *sin turnante al* JOHANO.—Mil spesmilojn! Por kio?

JOHANO.—Por kuracisto, sinjoro; juna sinjoro Rivers subite malsaniĝis. Nia kuracisto estas for, kaj . . . He! Kiu eniras la domon? Eble la mastro jam revenis; mi kuros por vidi. (*Foriras dekstre*).

O'CAL.—Mil spesmiloj! Ĉu estas en la mondo tiom da mono? Kaj por kuracisto! fripono! La okupado de lia speco estas ludi damojn unu kun la aliaj; la mondo estas la damtabulo, homoj estas la damoj, kaj ĉiu ludanto celas forigi la plej multajn. Per mia honoro, mi opinias, ke se ia trompado estas pli granda ol ĉiu alia, ĝi estas tio, kion oni nomas la kuracado. Laŭ mia opinio ĝi estas la arto amuzi pacienton dum la naturo faras la resanigon. Mil spesmilojn por kuracisto, kaj tiu ne trovebla! Mi demandas al mi, ĉu mi povus utili en ĉi tiu afero. Mi ja scias iom pri la ĉevalkuracado. Eble tio iel helpus; kaj mi ĉiam kunportas ĥirurgian ilaron—poŝtranĉileton kun sep klingoj. (*Ĝin eltiras*). Mi pripensu. Mi provis cent projektojn, pri kiuj mi tute scipovas, kaj ĉiuj malsukcesis. Nu, kiu povas scii, ke mi ne sukcesus, se mi provus ion, pri kio mi neniom scias?

JOHANO *revenas dekstre.*

JOHANO.—Ne, ĝi ne estis li. Li ne revenos ĝis noktomezo.

O'CAL., *al si mem.*—Nur palpi lian pulson kaj skui mian kapon eble havigus al mi pagon sufiĉan por la reveturo Londonon.

JOHANO, *al si mem.*—La kompatinda juna sinjoro! Restas do nenia espero pri li!

O'CAL.—Junulo, mi estas nekonata ĉi tie, sed se mi povas iel servi al

JOHANO.—Kio, sinjoro? Ĉu vi estas kuracisto?

O'CAL.—Mi pretendas scion de la medicino. (*al si mem*) Tio estas tute vera, kvankam efektive mi neniom scias pri ĝi.

JOHANO.—Kaj ĉu vi iros kun mi?

O'CAL.—Kompreneble mi iros. Mi vizitos vian junan sinjoron, sed mi ne diras, ke mi povos utili al li.

JOHANO.—Tamen vi penos?

O'CAL.—Nepre mi penos.

JOHANO.—Nu, sinjoro, neniu povus fari pli multe.

O'CAL.—Kompreneble ne, (*al si mem*) kaj neniu povus fari malpli multe ol mi. (*al JOHANO*) Nu, iru antaŭe kaj raportu pri mi. (*al si mem*) Mi pripensu. (*Haltas.* JOHANO *forkuras malantaŭe de la scenejo, kaj ĉe la elirejo sin turnas*) Kio urĝas min entrepreni ĉi tiun aferon? Kio, se ne tio, kio estas la fonto de ĉiuj grandaj entreprenoj—la malsato! La artoj, verkoj, revolucioj, ĉiuj ŝuldas sian originon ne al la koro aŭ la cerbo, sed al la stomako, tial pravigas min ĉiuj saĝuloj de la antikva tempo.

JOHANO.—Nu, sinjoro, pro la ĉielo ne malrapidu. La juna sinjoro eble estas duone mortinta.

O'CAL., *al si mem.*—Mi certe estas. (*al JOHANO*) Iru antaŭe, junulo. (*al si mem*) Pri unu afero mi estas certa; se mi ne povos forigi lian doloron, mi ja povos mian. (*Foriras kune kun JOHANO maldekstre.*)

Sceno II.

Ĉambro ĉe SINJORO RIVERS. SINJORINO MONTAGUE *dekstre, kaj* KAROLO *duonkuŝanta sur kanapo centre. Tablo kun skribilaro maldekstre.*

RIVERS *eniras maldekstre.*

RIV.—Kiel li fartas nun, Lidnjo ?

SINO. M.—Ne tiom da doloro, mi opinias, sed li ankoraŭ estas tre senripoza.

RIV., *maldekstre.*—Efektive la afero estas tre miriga. Hodiaŭ matene li estis tute sana, englutis matenmanĝon sufiĉan por plugisto, ses ovojn, preskaŭ funton da ŝinko, kaj, mi pensas, ĉirkaŭ litron da kafo.

SINO. M.—Li plendis la unuan fojon kiam ni estis elirontaj el la vilaĝo, iom post iom fariĝis pli malsana kiam ni estis transirantaj la kampojn, kaj kiam ni atingis la pordon . . . (KAROLO *ĝemas kaj piedbatas. Ili kuras al li*).

KAR.—Oj !

RIV.—Kompatinda knabo ! Kiel li suferas ! Tiu kanajlo Johano, tiel malrapidi ! kaj tiu brutulo, la kuracisto !

SINO. M.—Karolo, ĉu vi sentas vin pli bone ? Diru, kie estas la doloro ?

KAR.—Nu, onklino, nune estas mordeta sento ĉi tie— alia tie—kaj jen la spasmoj revenas. Oj !

RIV.—Mia kompatinda kara knabo !

BETI *enkuras maldekstre.*

BET.—Johano jam revenis, sinjoro, kaj venigis kun li nekonaton.

RIV.—Nekonaton ?

BET.—Jes, sinjoro, viron el Londono.

RIV.—Kiu li povas esti ? Lidnjo, provu iom kvietigi Karolon dum mi iras lin vidi. (*Eliras maldekstre*).

SINO. M.—La kapo ankoraŭ doloras, Karolo ? Jen estas iom pli da Kolonja Akvo. He ! Ne, mi eluzis la botelon. Beti, iru supren en mian ĉambron, kaj en la tirkesto plej proksima al la fenestro . . . Haltu, mi iros mem ; restu ĉi tie kaj prizorgu lin. (*Eliras dekstre*).

BET., *al si mem.*—Mi resti kaj prizorgi lin ! Mi tre

plivolus ne tion fari. Neniam mi posedis sufiĉe da kuraĝo por esti flegistino, alie mi jam povus havi ĉarman oficon en variola hospitalo . . . Se li freneziĝus! Li aspektas tre strange. Jen! li leviĝas, li pretiĝas ĵeti sin al mi. Ĉi tien! Mortigo! Helpon! (*Ŝi elkuras maldekstre. Li salte leviĝas ridante*).

KAR.—Ha! ha! Venkon, venkon! Ĉu iam iu tiel bele ruztrompis patron, onklinon, kaj fidelan servistinon? Nu, mi gajnis la unuan poenton. Mi jam ne foriros hodiaŭ vespere; la demando estas, ĉu mi povos resti post morgaŭ? Tio dependas de la kuracisto, kaj mi ne timas, ke li ne konsentos, post kiam mi klarigos mian sekreton. Ts! Iu venas, mi devas reiri sur la kanapon, montri pluajn spasmojn. (*Sin ĵetas sur la kanapon kaj batas per la piedoj*).

RIVERS reeniras kune kun O'CALLAGHAN maldekstre.

RIV.—Jen estas via paciento, sinjoro; kiel mi jam sciigis vin, la atako estis subita; hodiaŭ matene li estis tute sana kaj . . . (O'CALLAGHAN *alpaŝas al KAROLO kaj palpas lian pulson*) Iom strangaspekta homo . . . ankaŭ nekonato . . . necese, ke oni estu singarda . . . sed kian rilaton havas la aspekto al la talentoj? Se oni prijuĝus nuksojn laŭ ilia ŝelo, kiu ilin krevigus? (O'CALLAGHAN *iras antaŭen dekstren, kaj serioze rigardas RIVERS' ON*) Nu, sinjoro, kion vi opinias?

O'CAL.—Permesu, sinjoro, ke mi demandu, ĉu tiu junulo estas via sola filo?

RIV.—Jes, sinjoro.

O'CAL.—Mi bedaŭras aŭdi tion. Ĉu li havas patrinon?

RIV.—Ne, sinjoro; ŝi estas mortinta jam de kelke da jaroj.

O'CAL.—Nu, mi ĝojas aŭdi tion.

RIV.—Kial ĝoji, sinjoro?

O'CAL.—Nu, sinjoro, kvankam la afero estas malĝoja, tamen mi ne plenumus mian devon, se mi ne sciigus vin, ke . . .

RIV.—Granda ĉielo! Ĉu vi volas diri, ke ekzistas danĝero?

O'CAL.—Estas pli ol danĝero, sinjoro.

RIV.—Ĉu tio estas ebla ?

O'CAL.—Tiu aminda junulo, sinjoro, ne povas ekzisti ses horojn.

KAR., *levante la kapon*.—Kio ?

RIV.—Kia estas lia malsano, sinjoro ?

O'CAL.—Nu, sinjoro, mi ne tute povas ĝin diagnozi. Mi ne povas diri, ke mi iam antaŭe vidis ĝin, sed mi povas klarigi ĝian devenon. Ĝi estas tio, kion ni nomas febri-fugo . . . tio ja estas . . . la subhaŭtaj kapglandoj estas malsanece stimulataj de la peritoneaj kanaletoj, kaj sekve okazas kuntiriĝo de la ĉelaĵa teksaĵo de la kaverneca membrano. Ĉu vi komprenas ?

RIV.—Perfekte.

O'CAL., *al si mem*.—Vi do estas pli saĝa homo ol mi. (*al RIVERS*) El tio, sinjoro, nepre rezultos morto, se mi ne povos tuj haltigi ĝin. Tamen mia kuracmaniero estas potenca. Mi tuj ellasos sangon . . . Mi petas, ke vi servu al mi, kaj ordonu alporti kuvon.

KAR.—Kuvon !

O'CAL.—Ellasinte sep aŭ ok litrojn da sango, mi razos al li la kapon, almetos vezikigilon al la dorso kaj stomako, kaj lasos almordiĝi al la palpebroj dekduon da hirudoj. Mi opinias, ke tio, kun la helpo de miksturo glutota ĉiuhore, sufiĉos.

KAR., *al si mem*.—Sufiĉos ! Jes, por pretigi min por ĉerko.

RIV.—Kompreneble, sinjoro, oni devas tuj iri por la miksturo. Jen estas papero sur la tablo. Volu skribi la recepton.

O'CAL.—Jes, sinjoro. (*Sidiĝas al la tablo dekstre kaj skribas*) Ĝis nun bone ; nu, mi skribu la recepton.

RIV., *al si mem*.—Certe lia kuracmaniero estas forta. Li volas ellasi sangon el homo tiel same, kiel bieron el barelego.

O'CAL., *stariĝante kun papero*.—Jen ! mi opinias, ke tio estas laŭ la ordinara stilo. (*Legas al si mem*). “Kal . . . sen . . . kin . . . hidrarg . . . pil . . . tri serpentaj vosto-
toj kaj multo da trianguloj.” Nepre la apotekisto ne povos ĝin legi, sed des pli bone ; almenaŭ unu fojon en sia vivo li ne

povos malutili. (*al RIVERS*) Jen, sinjoro, volu preparigi tion kiel eble plej baldaŭ,

RIV.—En duono da horo. Mi sendos la serviston ĉevaldorse. Ĉi tien! Robin! Johano! (*Eliras maldekstre. KAROLO leviĝas*).

KAR.—Mi pensas, ke jam estas tempo ĉesigi ĉi tiun mortigon, sinjoro.

O'CAL.—Ha! Kion vi diras?

KAR.—Permesu, ke mi sciigu vin, sinjoro, ke . . .

O'CAL.—Ne malsana?

KAR., *dekstre*.—Nu, sinjoro, mi ne volas meti min sub via kuracado. Mi ne volas ke vi faru al vi la klopodon ellasi el mi sep aŭ ok litrojn da sango; plue, mi ne opinias, ke plibonigus mian vizaĝan aspekton havi dekduon da hirudoj pendantan de miaj palpebroj.

O'CAL.—Vi do trompis min!

KAR.—Nu, mi ja ne neas, ke mi vin trompis, sed se vi permesas, ke mi klarigu la motivon . . .

O'CAL., *al si mem*.—Fju! Jen savo. (*Transiras dekstren*).

KAR.—Mi estas certa, ke vi vidos la necesecon, kaj . . .

O'CAL.—Nu, unuvorte paroli, sinjoro, pro ia propra celo, vi permesis al vi kondukti kruele kontraŭ viaj parencoj kaj insulti membron de la fakultato.

KAR.—Insulti, sinjoro? Mi ja ne volis vin insulti, sinjoro.

O'CAL.—Sed vi ja tion faris, sinjoro. Vi volis elmeti al malestimo unu el la plej respektindaj profesioj. Mi havas nur unu respondon. Mi alvokos vian patron, malkaŝos vian konduton, kaj . . .

KAR.—Ne, ne! pro la ĉielo, sinjoro! Mi estas certa, ke kiam vi scios la motivon de la trompo, vi ĝin kompatos kaj pardonos al mi. Ĝi estis la lasta rimedo por konservi al mi la feliĉon, por resti proksime al bela kaj sindona knabino, kiu estas forironta el la lando.

O'CAL.—Sed kiel tio koncernas min, sinjoro? Vi ĉi tien venigis min, tute nekonatan, malŝparis mian tempon, mokis miajn sentojn, kaj . . .

KAR.—Kaj ĉu vi supozas, ke mi ne intencis vin kompensi? Se ducent spesmiroj . . .

O'CAL.—Ducent spesmiroj!

KAR.—Mi proponas ĝin kun plezuro.

O'CAL.—Nu, sinjoro, ĉar vi apelacias al mia humaneco . .

KAR.—Ĝuste tiel.

O'CAL.—Pro tio, ke vi konfidas al mia kunsento, kaj ne hezitis malkaŝi al mi vian sekreton, mi . . .

KAR.—Ĝuste tiel.

O'CAL.—Mi sentas, ke mi miavice devus respondi al via alpeto per komuniko de sekreto.

KAR.—Efektive!

O'CAL.—Vi certigas min, per via honoro, ke vi ne estas malsanulo?

KAR.—Mi efektive ne estas, sinjoro.

O'CAL.—Permesu do, ke mi plej konfidencie sciigu vin, ke mi ne estas *kuracisto*.

KAR.—Kio?

O'CAL.—Ne, sinjoro, sed kiel vi, tiel ankaŭ mi travivis multon da malbona traktado.

KAR.—Kio do venigis vin ĉi tien?

O'CAL.—Ha! pri tio mia celo estis sufiĉe medicina. Mi venis por pago.

KAR.—Kaj pro tio vi havis la impertinentecon turmenti miajn sentojn, kaj trompi mian respektatan patron.

O'CAL.—Nu, rilate al impertinenteco, mi opinias, ke neniu el ni povas esti fiera.

KAR.—Mi estas tondrofrapita!

O'CAL.—Nu, sinjoro, se via akra moralsento ofendiĝis, kompreneble mi foriros el la domo, kaj . . .

KAR.—Ne, ne, mi ne diris tion, sed ha, ha! Per mia vorto, la afero estas tre stranga.

O'CAL.—Ĉu ne vere?

KAR.—Vi estas Irlandano, mi vidas.

O'CAL.—Jes, sinjoro.

KAR.—Ĉu vi havas ian okupon?

O'CAL.—Nu, mi instruas la sciencojn.

KAR.—En kiu fako ?

O'CAL.—La komparativa anatomio. En la daŭro de ses jaroj mi elmontradas, ke homo, tute same kiel ĥameleono, povas subteni la vivon per aero.

KAR.—Nu, mi devas diri, ke vi aspektas kvazaŭ vi kuras sur malsuprenira vojo.

O'CAL.—Jes, sinjoro, kaj kvazaŭ mia malsuprenirado estus sur deklivo de Andoj, ĉar jam de dek jaroj mi kuradas malsupren, kaj, la diablo prenu min, mi ne povas atingi la malsupron.

KAR.—Nu, se resti ĉi tie valoras al vi la tempon, mi ne vidas, kial ni devus nuligi nian interkonsenton.

O'CAL.—Vi ne vidas ?

KAR.—Se la ducent spesmiloj kompensos al vi la prokraston, bone estos ankoraŭ ludadi niajn rolojn. Mi daŭrigos mian malsanon, kaj . . .

O'CAL.—Mi povas resanigi vin ĉar mi jam konas vian malsanon.

KAR.—Ĝi do estas interkonsento ?

O'CAL.—Jen mia mano.

KAR.—Interkonsentite ! Sed pri unu afero gardu vin bone. Nia kuracisto certe venos, kaj se li parolus kun vi . . .

O'CAL.—Kiel diras la latina sentenco : *Ex nihilo, nil fit.*

KAR.—Nu, do, tiu punkto estas decidita. Mi ankoraŭ restos apud mia karega Julino.

O'CAL.—Kaj mi renovigos mian konon de manĝotablo.

KAR.—Ha ! ha ! Se vi volus pligrandigi vian praktikon, mi povus liveri al vi pacienton. Mia onklino, sinjorino Montague, estas iom malsaneta.

O'CAL.—Kiu ?

KAR.—Sinjorino Montague.

O'CAL.—Tiu konata nomo vekas ĉiujn miajn malĝojegojn. Permesu, ke mi demandu, ĉu la sinjorino estas el Jorkŝiro ?

KAR.—Ŝi ja estas el tie.

O'CAL.—Kaj ŝia fraŭlina nomo estis ?

KAR.—Rivers.

O'CAL., *al si mem.*—Per ĉiuj Gracioj, ĝi estas ŝi mem. Kia renkontiĝo tio estus! Mi tuj estus senmaskigita, perdus la ducent spesmilojn kaj . . .

RIV., *post la scenejo.*—Beti, sendu Johanon ĉi tien tuj kiam li revenos.

KAR.—He! Jen venas la patro!

O'CAL.—Nu, do, kuŝiĝu kaj ŝajnigu dormon. Mi devas montri al la maljunulo iom de mia kapablo. (KAROLO *reiras al la kanapo, kuŝiĝas, kaj ŝajnigas dormi.* O'CALLAGHAN *sidiĝas*).

RIVERS *eniras maldekstre.*

RIV.—Nu, sinjoro, mi sendis la serviston. Kiel nun fartas Karolo?

O'CAL.—Rigardu!

RIV.—Dormas!

O'CAL.—Jes, sinjoro, tiel trankvile, kiel kiam li ripozis sur la brusto de sia patrino.

RIV.—Mirinde! Tiel estas.

O'CAL.—Mi ne dubas, ke kiam li vekigis, vi vidos grandan ŝanĝon en li.

RIV.—Nu, sinjoro, vi estas magiisto. Mi lasis lin en dolorego, kaj li jam estas kvieta, ŝajne sen doloreto; kiel vi okazigis tiel mirindan ŝanĝon?

O'CAL.—Nu, sinjoro, mi ne amas malkaŝi sekretojn de nia arto, sed se vi efektive deziras scii . . .

RIV.—Mi havas tre fortan deziron.

O'CAL.—Nu, do, sinjoro . . . kompreneble vi aŭdis, ke oni uzas la magnetismon kiel agenton.

RIV.—Magnetismon?

O'CAL.—Tiun fakton pri la fiziko, ke kiam kuniĝas du homoj, kiuj similas unu la alian laŭ *temperamento*, unu povas regi la agojn de la dua.

RIV.—Mi ja aŭdis pri tio.

O'CAL.—Nu, sinjoro, vidinte, ke la malsano de via filo ne estas ordinara, mi decidis provi la influon de la magnetismo. Mi baldaŭ trovis, ke ekzistas inter ni rilateco, kaj

ke mi povas utili al li. Tial, kiel oni diras, sinjoro, mi metis min *en staton de interkonsento* kun li, kaj jen la rezultato — lia doloro jam foriĝis, lia malkvieto jam ĉesis.

RIV.—Kaj vi faris ĉion ĉi tion per . . . ?

O'CAL.—Per kelke da movoj per la mano. Ĉu vi neniam vidis la procedon? Ĝi estas la plej facila afero en la mondo. Jen tiel. (*Kelkfoje faras movojn per la mano antaŭ la vizaĝo de RIVERS*).

RIV.—Kiel strange! Nu, do, sinjoro, se mi komprenas vin, vi kaj mia filo estas en stato de interkonsento?

O'CAL.—Ĝuste tio.

RIV.—Kaj tio ebligas, ke vi regu ĉiujn liajn agojn?

O'CAL.—Precize.

RIV.—Kiel tre mirinde!

O'CAL.—Se li moviĝus nun, mi donus al vi pruvon de ĝi. He! Mi pensas, ke li moviĝas. Nun vidu, sinjoro, kiam mi levas la manon tiel, li etendas sian dekstran brakon, kaj kiam mi mallevas ĝin tiel, li levas la maldekstran kruron. (*KAROLO obeas liajn ordonojn*).

RIV.—Efektive mi ne povas kredi al miaj okuloj.

O'CAL.—Observu ankoraŭ, sinjoro. Movante la manon tiumaniere, mi eltiras la magnetan influon kaj lasas lin vekigi; kompreneble la doloro tuj revenas, kaj li elmontras ĉiujn ordinarajn fenomenojn. (*Faras kelke da manmovoĵ. KAROLO sin turnas, tordiĝas, kaj fine kriegas*).

RIV.—Jes, jes!

O'CAL.—Kaj nun, sinjoro, rekvietigi lin. (*Faras kelke da manmovoĵ, kaj KAROLO ree endormiĝas*).

RIV.—Ĝi estas absolute magio.

O'CAL.—Tamen, sinjoro, produktis ĝin nur movo tiel farita, kaj alia tiel. (*Faras movojn per la mano antaŭ RIVERS kaj signalas al KAROLO*).

RIV., *al si mem.*—Ĉi tiu estas tre mirinda homo. Mi devas pli sciigi pri li. (*al O'CALLAGHAN*) Ĉu estas permesite al mi, sinjoro, demandi la nomon de sinjoro tiel lerta pri sia profesio?

O'CAL., *al si mem.*—Mian nomon! Jen embaraso! Mi ne povas diri O'CALLAGHAN kaŭze de sinjorino Montague.

RIV.—Se vi havas karteton kun vi, mi estos tre feliĉa ĝin ricevi.

O'CAL.—Karteton! Nu, efektive, sinjoro, mi dubas ke . . . (*Serĉas en la poŝo*). (*al si mem.*) Jes, jen ja estas karteto. Ĝi estas de mia kunpasaĝero, kaj feliĉe li estas kuracisto. (*al RIVERS*) Ha! la ĝusta aĵo. Jen, sinjoro, (*Donas la karteton al RIVERS*).

RIV., *legas*.—“Doktoro Banks, numero 15, Strato Victoire, Parizo.”

O'CAL.—Jes, sinjoro.

RIV., *al si mem.*—Ĉu povas esti? Tio estas la nomo kaj adreso de la patro de Julino.

O'CAL., *al si mem.*—Ŝajnas, ke la maljunulo estas frapita.

RIV., *al si mem.*—Tiu malfeliĉa homo, kiu jam de tiom multe da jaroj estas kvazaŭ nekonato al sia familio.

O'CAL., *al si mem.*—Estas la karteto, kiu lin tiklas; kiel feliĉe, ke mi ĝin havis.

RIV., *al si mem.*—Li do revenis Anglujon, kaj tiel neatendite troviĝas en mia domo.

Eniras JOHANO maldekstre.

JOHANO.—Mi petas, sinjoro, kiam vi volas la vespermanĝon?

RIV.—Tuj, se ĝi estas preta.

O'CAL., *al si mem.*—Vespermanĝo! Tiu sono vigligas min kiel trumpeto.

RIV.—Voku sinjorinon Montague.

O'CAL., *al si mem.*—Kaj tio dispremas min kiel lavango. (*Eliras JOHANO maldekstre*).

RIV.—Doktoro Banks, mi esperas, ke vi ne havas antaŭaranĝon. Volu vespermanĝi kun ni hodiaŭ.

O'CAL.—Nu, sinjoro, mi havas nenion kontraŭ tio. Mi ja ĉiam deziras manĝi je la nuna horo pro filozofia motivo.

RIV.—Efektive, kial?

O'CAL.—Tial, ke la naturo abomenas malplenaĵon.

RIV., *al si mem.*—Mi devas zorgi, ke li ne eksci, ke lia infano estas ĉi tie, almenaŭ ĝis kiam mi sciigos pri liaj sentoj; estas tre eble, ke mi estos la perilo de ilia repaciĝo.

SINO. MONTAGUE *eniras dekstre.*

SINO. M.—Ĉu efektive! Karolo profunde dormanta!

RIV.—Jes, Lidnjo, sen doloro aŭ febro; ni devas danki lian sendolorecon, eble lian vivon, al la mirinda lerteco de ĉi tiu sinjoro. Permesu, sinjoro, ke mi prezentu vin al mia fratino, sinjorino Montague (*kondukante antaŭen SINJORINON MONTAGUE. Ŝi rekonas O'CALLAGHAN'ON*).

SINO. M.—Ĉu povas esti?

RIV.—Nu, kio estas al vi?

SINO. M.—Subtenu min. Ĝi estas lia spirito! (*Fale sidiĝas sur seĝon dekstre, akre kriegante*).

O'CAL.—Ne maltrankviliĝu, sinjoro. Nur ataketo de la faliga malsano, tio estas ĉio. Membroj malfortaj, menso malorda, vidado vaganta.

SINO. M.—Sinjoro O'CALLAGHAN!

O'CAL.—Ĝuste tiel. Jen simptomo, sinjoro. Ŝi supozas, ke mi estas unu ŝia amiko. Estu tiel kompleza, kaj alportu glason da akvo, dum mi operacias je la sinjorino.

RIV.—Mi tuj alportos ĝin. Kiel strange! Ĉu furiozas epidemio? (*Eliras maldekstre*).

SINO. M.—Sinjoro O'Callaghan, kion signifas ĉi tio?

O'CAL.—Signifas, mia anĝelo? Kion ĝi povus signifi, se ne, ke . . .

SINO. M.—Kio venigis vin ĉi tien, sinjoro?

O'CAL.—Vi, sinjorino.

SINO. M.—Mi?

O'CAL.—Kompreneble, por paroli al vi, rigardi vin, rigardadi ankoraŭ unu fojon tiun vizaĝon, kiu jam de dek longaj jaroj estas la sola stelo en mia mallumo. Mi kuraĝis malgraŭ ĉio.

SINO. M.—Ĉu tio estas ebla?

O'CAL.—Ĝi estas vero, per ĉiuj doloroj, kiujn mi nun sentas ĉi tie (*metante la manon sur la koron*)—ne, ĉi tie (*metante la manon sur la stomakon*).

RIVERS *eniras kun glaso da akvo maldekstre. BETI eniras malantaŭe.*

RIV.—Jen estas la akvo, Doktoro.

O'CAL.—Tio ne estas bezona.

BET.—La vespermanĝo estas servata, sinjoro.

O'CAL.—Tio ja estas bezona.

RIV.—Ĉu ŝi jam refortiĝis ?

O'CAL.—Perfekte, sinjoro.

RIV.—Kiel vi ĝin faris ?

O'CAL.—Ho, per la sama rimedo, vi scias. (*Faras movojn per la mano*).

RIV.—Kia tre mirinda homo !

KAR., *al si mem.*—Kiel, pro la diablo ! Ĉu li magnetizis eĉ mian onklinon ?

RIV.—Nu, doktoro, volu doni la brakon al sinjorino Montague. Atentu, Beti, ke neniu malkvietigu Karolon. Li estas en dolĉa dormo ; la talento de ĉi tiu persono estas preskaŭ superhoma. (*Eliras maldekstre. Komencas sekvi lin O'CALLAGHAN, donante la brakon al SINJORINO MONTAGUE. KAROLO leviĝas de la kanapo*).

KAR.—Diru, amiko, ĉu ĉio iras bone ?

O'CAL.—Bone ! Per mia animo, ĉio iras por ni tiel bone, kiel por dujara vulpo sub la ripozostango de kokinaro. (*al Sino. M.*) Ni iru, mia anĝelo. (*Kurteno falas.*)

FINO DE AKTO UNUA.

AKTO II.

Salono ĉe SINJORO RIVERS, lukse meblita, malfermiĝanta malantaŭe de la scenejo al herbejeto. Pordoj dekstre kaj maldekstre.

RIVERS *eniras kune kun JULINO tra pordo maldekstre.*

RIV.—Nun, JULINO, ni estas solaj, kaj mi povas fari malkaŝon. Ĉu vi rimarkis la sinjoron ĉe la manĝo?

JUL.—Jes, sinjoro.

RIV.—Ĉu vi sentis ian misteran inklinon ĵeti vin al lia brusto?

JUL.—Tute ne, sinjoro!

RIV.—Kompreneble vi memoras vian *patron*?

JUL.—Tre neperfekte, mi bedaŭras. Rememoru, ke li forestas jam de dek jaroj, kaj . . .

RIV.—Sed vi estas certa pri unu afero—ke li loĝas en Parizo?

JUL.—Tute certa, sinjoro.

RIV.—Kaj vi eĉ konas la straton?

JUL.—Strato Victoire, Numero 15.

RIV.—Nu, do, vi povas kompreni, kiaj estis miaj sentoj, kiam mi petis la sinjoron pri karteto, kaj li metis ĉi tiun en mian manon (*Donas al ŝi la karteton*).

JUL.—Ĉu povas esti? Ho! lasu min kuri al li.

RIV.—Ne, ne! Tio povus ruinigi ĉion; vi scias, ke lia karaktero estas fiera kaj sentema; kaj pro la iluzio, kiu regas lin, ni devas agi singarde al li. Mi ja scias, ke se mi estus abrupta al li, li tuj ekflamus. Mi devas ekuzi okazon, kiam li estos sola, por enluli liajn suspektojn, veki liajn simpatiojn. He! iu venas; eble estas li; ni nin retiru unu momenton kaj faru preparojn por la provo. (*Eliras kune kun JULINO malantaŭe, maldekstre de la scenejo*).

Eniras KAROLO kaj O'CALLAGHAN maldekstre.

KAR.—Vi do ŝatis vian vespermanĝon.

O'CAL.—Mian vespermanĝon! Mian festenon, sinjoro! Tielan supon, tielan fiŝaĵon, tielan ĉasaĵon mi neniam vidis

sur tablo ; kaj pri la bordovino, per mia animo, kiam mi estis trinkanta ĝin, mi certe bedaŭris, ke mi ne havas tiom da buŝoj, kiom la rivero Ganĝo.

KAR.—Sed diru, kio okazis ? La patro, vi diras, havas neniujn suspektojn ?

O'CAL.—Suspektojn ? Li estas tiel konfidema kiel suĉporkido ; li estas tiel danka por la bono, kiun mi faris al vi, ke li decidis, ke mi dormu ĉi tie ĉi tiun nokton, por ke mi estu proksime al mia paciento.

KAR.—Ha, ha ! Kiel bonkora li estas !

O'CAL.—Ĉu ne vere ? Pro lia trankvileco mi petis permeson foriri, por vidi kiel vi fartas. Kompreneble mi trovas, ke kvankam vi estas pli sana, tamen, estas neeble, ke vi foriru de la domo ĝis post du semajnoj.

KAR.—Ne ĝis tiam, la plej frue.

O'CAL.—Nun, mia amiko, mi devas diri al vi, ke ekzistas nur unu ŝanco, kiu povus tute vanigi nian interkonsenteton.

KAR.—Kaj tio estas ?

O'CAL.—Estas ĉi tie sinjorino, kiun koni mi iam havis la honoron.

KAR.—Vi ne volas diri mia onklino ?

O'CAL.—Mi ja volas ; kaj ĉar ŝi postulas klarigon, eble estus plej bone konfesi.

KAR.—Ne eĉ por la mondo ! Ŝi estas tiel skrupula kiel maljuna fraŭlino, kaj pro tio, ke Julino estas ŝia amikino, ŝi tuj sciigus la patron.

O'CAL.—Oho !

KAR.—Vi devas kontentigi ŝin per fabelo.

O'CAL.—Sed kion fari, se ŝi estas sufiĉe lerta por eltrovi la trompon.

KAR.—Nu, do, se ne estas alia rimedo, vi devos agi al ŝi tiel same, kiel al la patro—magnetizi ŝin.

O'CAL.—Nu, mi jam faris tion.

KAR.—He ! Mi vidas ŝin en la ĝardeno. Ŝi evidente volas paroli al vi. Tial mi lasas vin, sed, pro la ĉielo, estu singarda. (*Eliras tra pordo dekstre*).

O'CAL.—*al si mem.*—Bone, Felikso, amiko, mi opinias, ke la tajdo jam komencas alflui. Nun la hazardo tute

favoras min ; mi pasigos la nokton ĉi tie, kaj morgaŭ povos reiri Londonon kun sumo en la poŝo, per kiu mi povos ekirigi novan entreprenon ; mia sola timo estas pri mia malnova amikino ĉi tie, tiu, kiu iam estis fariĝonta Sinjorino O'Callaghan. Kiel stranga estas nia renkontiĝo post dekjara diseco. Kompreneble ŝi jam forgesis la estintecon, ĉar ŝi havas edzon, kaj, kvankam oni devigis ŝin edziniĝi kun li, devas esti, ke ŝi jam amas lin post tiom da tempo, ĉar oni diras, ke la tempo karigas ĉion. Tamen mi dubas pri la vero de tiu onidiro, ĉar mi konas la malriĉegecon jam de kelke da jaroj, kaj la diablo prenu min se la tempo karigas al mi *tion*.

SINO. M. *eniras malantaŭe.*

SINO. M.—Sinjoro O'Callaghan !

O'CAL.—*sin turnante.*—Sinjorino Montague.

SINO. M.—Fine ni estas solaj, kaj kompreneble vi ne povas miri je mia surprizo. Mi ja pensis, ke vi mortis.

O'CAL.—Nu, mi ne diras, ke mi efektive vivas. De kiam ni disiĝis, mi estas kvazaŭ derviŝo, homo kiu vagadas kaj fastadas.

SINO. M.—Vian nunan profesion do vi alprenis pro neceso ?

O'CAL.—Jes, sinjorino, pro absoluta neceso, mi certigas vin.

SINO. M.—Kompreneble vi estas edziĝinta ?

O'CAL.—Tute ne. Mi ankoraŭ punas la virinan sekson pro via malfideleco. Mi estas libera kiel la aero, (*al si mem*) kaj egale malplena.

SINO. M., *al si mem.*—Kompatindulo, *li* do tenis sian vorton, kvankam mi ne tenis mian. (*al O'CALLAGHAN*) Mi devas do konkludi, ke vi scias mian nunan staton ?

O'CAL.—Ho ! ne nomu ĝin. Domaĝu miajn sentojn.

SINO. M.—Sendube vi aŭdis, ke mi estas vidvino, kaj. . . .

O'CAL.—Kio ?

SINO. M.—Vidvino.

O'CAL., *al si mem.*—Ĉielo ! jen novaĵo !

SINO. M.—Pasis nur ses monatoj de kiam mi ĉesis porti funebbron.

O'CAL.—Ne unu tago pli aŭ malpli, sinjorino. Mi kalkulis ĉiun tagon de tiam.

SINO. M.—Sed vi ankoraŭ portas nigraĵojn.

O'CAL.—Jes, sinjorino, mi min vestadas nigre de post tiu fatala mateno, kiu. . . (*eksopiras*).

SINO. M.—*al si mem*—Ĉu estis iam tia fideleco ?

O'CAL.—Perdinte ŝin, kiu estis la celo de mia animo, mi kvazaŭ enterigis la tutan mondon.

SINO. M.—Mi aŭdis, ke vi elmalŝparis tutan vian havon—fariĝis diboĉulo.

O'CAL.—Kaj ĉu vi povas miri ? Kion ne farus viro por sufoki sian malesperon ?

SINO. M.—*al si mem*.—Kompatindulo ! Kiel kortuŝas min lia amo.

O'CAL.—Rigardu min, sinjorino, ĉi tiun velkan figuron, ĉi tiujn enprofundiĝintajn okulojn. . . . Ĉu vi iam vidis sur la marbordo de Kornvalo pli kompletan rompaĵon ? Mi ne ĝenos vin per historio de mia ruiniĝo. Sufiĉas diri, ke, de kiam mi perdis vin, mi spertis ĉiun gradon de la mizero, de sunbrilo kaj ĉampanvino ĝis nuboj kaj pluvego.

SINO. M.—Nu do, por klarigi al vi mian viziton ĉi tien, mi devas diri al vi, ke la riĉo, kiun mi heredis. . . .

O'CAL.—Ho, ne parolu al mi pri riĉo. . . . Vi scias, kiel mi malestimas ĝin.

SINO. M., *al si mem*.—Liaj sentoj estas tiel noblaj kiel ĉiam. (*al O'CALLAGHAN*) Ĝi estas bieno en Jorkŝiro, kaj ĉar ĝi tute disigas min de la societo, mi deziras senŝargiĝi min je ĝi per. . . .

O'CAL.—Ho, vi deziras do societon, kaj vi estas ŝargita de bieno ?

SINO. M.—Ĝuste tio.

O'CAL.—Nu, do, karulino mia, kiel bonokaza estas nia renkontiĝo ; ĉar jen estas mi, kiu povas doni al vi la unuan kaj liberigi vin de la dua.

SINO. M.—Vi estas tre kompleza, sed mia frato ja faros tion.

O'CAL.—Pu! pu! Edzon vi bezonas, ne fraton.

SINO. M.—Edzon?

O'CAL.—Komprenoble! Ĉu vi ne diris, ke vi deziras senŝargigi vin je via bieno?

SINO. M.—Nu, nu: sed vi scias, kion mi volis diri.

O'CAL.—Certe—ke vi tiel ŝatis la edzegan dozon, ke vi estas preta denove preni la miksturon. Nu, do, jen estas mi, konvene preparita kaj preta esti prenata.

SINO. M.—Ho, vi impertinenta viro, vi tre bone scias, ke. . . .

O'CAL.—Ĝi estus justa interŝanĝo—certe ĝi estus. Vi deziras societon, kaj vi estas ŝargita de riĉo. . . . Mi bezonas riĉon kaj povas fari al vi societon.

SINO. M.—Nu, nu, ni parolos pri tio en alia tempo.

O'CAL.—Alia tempo! Ĉu vi dirus al mortanta homo, ke vi resanigos lin en alia tempo? Permesu, ke mi tuj eksciu mian sorton.

SINO. M.—Ne, ne; post kiam mi iros Londonon, tiam skribu al mi.

O'CAL.—Skribu! Kial skribi, kiam mi povas paroli al vi dekduon da leteroj rekte al via vizaĝo, kaj vi povas per unu rigardo liveri al mi tutan poŝtoŝicejon da leteroj. (*Kaptas ŝian manon kaj ekgenuas.*)

SINO. M.—Ne genuu, pro la ĉielo!

O'CAL.—Mi estas tiel pia, kiel rompgenua poŝtoĉevalo, ĝis mi ricevos vian respondon.

SINO. M.—Sed, sed. . . . Iu venas!

O'CAL.—Mi petas respondon.

SINO. M.—Konsideru, pro la ĉielo!

O'CAL.—Respondon. (*tirante ŝin al si*).

RIVERS *eniras de la herbejeto.*

RIV.—Doktoro Banks!

SINO. M. *akrekrias kaj apogfalias sur la ŝultron de O'CALLAGHAN. RIVERS paŝas antaŭen. O'CALLAGHAN faras movojn per la mano antaŭ SINO. M.*

O'CAL.—Ankoraŭ ataketo, sinjoro.

RIV.—Kio? Ankoraŭ atako de la faliga malsano?

O'CAL.—Jes, sinjoro. Metu seĝon, mi petas. (RIVERS metas seĝon. SINO. MONTAGUE *sidfalas sur ĝin*).

RIV.—Dio benu mian animon! Kian familion mi havas! Ĉu vi sentas vin pli bone, Lidnjo?

SINO. M.—Jes, frato, pli bone—kiel malagrabra estas ĉi tiu sintrudo!

O'CAL.—Vi vidas, sinjoro, ke ŝi ankoraŭ estas malsaneta, tamen, se ŝi nur akceptos mian konsilon, mi garantias, ke ŝi baldaŭ resaniĝos.

RIV.—Mi petas do, Lidnjo, ke vi plaĉu al mi per konsento.

O'CAL.—Mi petas, sinjorino. Vi plaĉus al ni ambaŭ.

SINO. M.—Mi jam estas pli forta; se vi permesas, mi foriros. (*al O'CALLAGHAN*) Ho, vi malbona homo, kion mi povas diri al vi?

O'CAL.—Kion, karulino! Diru, ke vi fariĝos mia post unu semajno.

SINO. M. *eliras tra pordo maldekstre.*

RIV.—Nu, doktoro, ŝajnas, ke vi komprenas la staton de la vidvino?

O'CAL.—Perfekte, sinjoro, kaj mi diras, ke mi ne lasos ŝin, ĝis vi vidos ŝanĝon.

RIV., *al si mem.*—Lia humaneco egalas lian lertecon.

O'CAL., *al si mem.*—Vidvino kun riĉo! Ankoraŭ unu fojon mi estas bonstata homo.

RIV., *al si mem.*—Nu, do, ni estas solaj, kaj mi povas fari mian malkaŝon. (*al O'CALLAGHAN*) Nu, doktoro, Karolo jam fartas tiom pli bone, ke li efektive estas sufiĉe forta por iom promeni en la ĝardeno.

O'CAL.—Mi ĝojas tion aŭdi, sinjoro.

RIV.—Kaj se vi ĝojas, kiom pli mi? Kion mi devas diri al tiu, kiu faris al mi tian feliĉon?

O'CAL.—Nu, nu, estimata sinjoro, ne pluajn dankojn; mi ja ne meritas ilin.

RIV.—Vi certe meritas multe pli ol dankojn, sinjoro, aŭ bagatelan rekompencan per pago. Vi devas konfesi, ke pro tio, ke vi faris tiom por mi, mi devus iom fari por vi.

O'CAL.—Efektive, sinjoro, mi vin dankas, sed . . . (*al si mem*). Kio venas nun, mi volus scii. Ĉu pli da feliĉo?

RIV.—Ĉar mi tre deziras elmontri mian dankecon, permesu, ke mi, kiel amiko, diru, ke mi konas vian malfeliĉan historion.

O'CAL.—Pro la diablo, vi konas!

RIV.—Mi scias, ke la temo estas malĝoja; mi sentas ĝian neordinaran delikatecon; sed ĉar mi celas vian feliĉon, permesu, ke mi parolu pri via edzino kaj infano.

O'CAL.—Mia kio, sinjoro!

RIV.—Via edzino kaj infano, sinjoro.

O'CAL.—Vi songas, sinjoro!

RIV.—Tiu malfeliĉa paro, kiu dek longajn jarojn . . .

O'CAL.—Sed ĉio ĉi tio estas sensencaĵo, sinjoro. Mi estas simple . . .

RIV., *montrante la karteton*.—Doktoro Banks, Strato Victoire, numero 15, Parizo.

O'CAL.—Jes, sinjoro.

RIV.—Kaj sekve, edzo de mia respektata amikino ĉe Strato Gilford, kaj patro de ŝia bela kaj klera filino.

O'CAL., *al si mem*.—Fju!

RIV.—Via lingvaĵo ne mirigas min, ĉar mi scias, ke vi malĝoje kredas, ke via sindonema edzino estas malinda vian amon.

O'CAL., *al si mem*.—Jen marĉo, en kiun mi enpaŝis.

RIV.—Sed ĉu mi devas permesi, ke tiu iluzio daŭru, kvankam mi scias ŝian senkulpecon, kvankam mi scias kiel ŝi vin amas kaj kiel ŝi ĝojus pro via alveno.

O'CAL., *al si mem*.—La diablo ĝin prenu, kion fari?

RIV.—Vi silentas, vi embarasiĝis. Pripensu, sinjoro; se via edzino ja eraris, ĉu ŝi ne elpagis por sia eraro. Ĉu ne sufiĉe punis ŝin dek longaj jaroj da dolora diseco?

O'CAL., *al si mem*.—Jen mi havas; nu, mi devas iri pluen.

RIV.—Permesu do, ke mi esperu, ke vi respondos al ŝiaj deziroj, ke vi grandanime forgesos la estintecon, kaj . . . (O'CALLAGHAN *eltiras poŝtukon kaj sin turnas flanken, kvazaŭ baraktante kun siaj sentoj*). Larmoj! Ho! tio estas

feliĉa signo. Lasu ilin flui, sinjoro, la naturo havas nenian glacieron, kiu povas elteni kontraŭ degelo. Lasu ilin fluadi, sinjoro, por certigi min, ke . . . (O'CALLAGHAN, *post plua barakto, sin turnas*).

O'CAL.—Sinjoro Rivers.

RIV.—Jes, sinjoro.

O'CAL.—Vi ja ne povas miri je mia emocio ?

RIV.—Miri, sinjoro ?

O'CAL.—Vi ne povas miri, ke via peto konfuzis min.

RIV.—Tute ne ; vi ne atendis, ke mi faros ĝin al vi.

O'CAL.—Mi konfesas, sinjoro, mi ne atendis.

RIV.—Kiel vi povis ? vi ne sciis, ke mi scias, ke vi havas familion.

O'CAL.—Kiel, pro la diablo, mi povis, sinjoro, (*al si mem*) ĉar mi mem ne sciis tion.

RIV.—Mi komprenas viajn sentojn, sinjoro ; sed ĉar . . .

O'CAL.—Kompreneble, sinjoro, pro tio, ke la afero estas malkaŝita, kaj ĉar vi diras, ke mia edzino pentas pri sia konduto, pri kies karaktero estas neeble, ke mi parolu . . .

RIV.—Vi ŝin pardonos kaj akceptos ?

O'CAL.—*post eksopiro*.—Ĝi estas mia devo kiel Kristano.

RIV.—Nu, do, sinjoro, mi treege ĝojas informi vin, ke ŝi nun vojaĝas de Londono, kaj ke via filino estas en la apuda ĉambro.

O'CAL.—Kio, sinjoro ?

RIV.—Jes, sinjoro ; via filino atendas vian permeson veni al vi. Neniam por mi estis pli granda feliĉo, ol konduki ŝin al vi.

O'CAL.—Sed, sinjoro Rivers. . .

RIV.—Ne, ne ; mi ne povas permesi, ke vi kontraŭstaru min. Vi promesis akcepti ŝin, kaj akcepti ŝin vi ja devas. (*Eliras tra pordo maldekstre*).

O'CAL.—La diablo flugu for kun li ! En la apuda ĉambro ! Oni senmaskigos min tuj post minuto. Mi estos tute ruinigita, kaj nur pro tio, ke la hazardo tro favoris min. Antaŭ unu horo mi havis nek hejmon nek amikon, kaj nun mi havas jam faritan familion. Kion fari ? Nepre la

knabino konas sian patron. Ŝi tuj senmaskigos min, kaj . . . per mia honoro, jen ŝi venas. Ho, por mi ĉio finiĝas! Jen mia antaŭa malbona sorto! Mi estas perdita! Mi estas ruinigita homo! La fino alvenis! Mi estas . . .

RIVERS *enkondukas JULINON de pordo maldekstre.*

JUL.—Ĉu povas esti? Mia kara, kara patro! (*kuregas en liajn brakojn*).

O'CAL., *al si mem.*—Ĉio iras bone, per Jupitero!

RIV., *al si mem.*—Ĉi tiu sceno repagas al mi miajn penojn.

O'CAL.—Amata mia infano! Ĉu ni ree renkontas nin?

JUL.—La feliĉo estas reciproka, tion mi certigas al vi.

O'CAL.—Haltu, permesu, ke mi rigardegu vin. Ho, kiel vi similas vian patrinon.

RIV., *al si mem.*—Oni ne devas altrudi sin al tiel sankta ĝojo. Nur necese estas, ke la patrino alvenu por plenigi la feliĉon, (*Eliras tra pordo maldekstre*).

O'CAL.—Mia anĝela infano! Kiom vi kreskis! Vi tiel ŝanĝiĝis, ke efektive mi apenaŭ rememoras vin.

JUL.—Ĉu efektive?

O'CAL.—Se oni ne antaŭe dirus al mi, ke vi estas mia filino, mi neniam kredus tion.

JUL.—Kaj vi, paĉjo, aspektas tre alie, ol mi atendis. Vi ŝajnas tiom pli juna, kaj . . .

O'CAL.—Efektive? Sed do, ŝajnoj iufoje estas trompaj. Ne supozu, ke mi estas ĝuste tio, kio mi ŝajnas.

JUL.—Tio estas vera.

O'CAL., *al si mem.*—Per mia honoro, ŝi estas senegala; kiu ne volus posedi tian filinon?

JUL., *al si mem.*—Kiel oni povis kredi, ke li estas senkora kaj nealirebla? Ho, kiel oni eraris!

O'CAL.—Pasis ja dek jaroj de kiam ni disiĝis. Efektive ŝajnas, ke ankoraŭ hieraŭ mi portadis vin sur ĉi tiuj brakoj, ridetantan, balbutantan infaneton. Kompreneble vi ne memoras la infanan puŝveturilon, kiun mi aĉetis por vi.

JUL.—Ne, paĉjo, mi ne memoras.

O'CAL.—Nek la eburan suĉringon, kiam vi komencis ricevi dentetojn?

JUL.—Nek tion, strange diri.

O'CAL., *al si mem.*—Pli strange estus, se vi ja memorus. Ho, kiam mi rigardas vin, kiaj rememoroj superŝutas min! Ĉu vi memoras la okazon, Maria, kiam. . . .

JUL.—Maria! Ĉu vi forgesis mian *nomon*, paĉjo? Ĝi estas Julino.

O'CAL.—Jes, jes! ĝi estas Julino. Ĉu mi diris Maria? Mi estis pensanta pri via patrino.

JUL.—Sed ŝia nomo estas Suzano.

O'CAL.—Jes . . . certe, tio estas ŝia ĝusta nomo, ŝia baptonomo; sed la fakto estas, ke kiam mi diris via patrino, mi estis pensanta pri *mia* patrino.

JUL.—Ha, kiel feliĉa, kiel surprizata estos la patrino, renkontante vin!

O'CAL.—Nenia dubo pri tio.

JUL.—Sed, paĉjo, vi ankoraŭ ne demandis pri Johano.

O'CAL.—Johano?

JUL.—Jes, paĉjo.

O'CAL.—Kiu, pro la diablo, li estas?

JUL.—Ĉu vi forgesis, ke vi havas filon?

O'CAL.—Kia nenatura malbonegulo mi estas. Efektive, mia kerubo, mi parolas al vi kiel nekonato.

JUL.—Li ankoraŭ estas ĉe sinjoro Jones.*

O'CAL.—Ho, li ankoraŭ estas ĉe sinjoro Jones. Ĉu vere?

JUL.—Kaj kompreneble vi aŭdis, ke sinjoro Jones transloĝiĝis en Clapham'on.†

O'CAL.—Clapham'on! Mi pensis, ke estis en Tooting'on.‡ Kaj kiel statas tuta lia familio?

JUL.—Lia familio! Mi ne sciis, ke li estas edziĝinta.

O'CAL.—Ne edziĝis? (*al si mem*) Mi memoras tro multe.

JUL.—La patrino diros al vi ĉion pri lia bankroto, sed ni ne pensu pri tio; ree vidi vin repagas al ni ĉiujn perdojn.

O'CAL.—Ĝi tion faras, mia infano, ĝi tion faras. (*al si mem*) Per mia animo, ĉi tiu amemo estas treege agrabla.

* Elparolu: Ĝonz. † Elparolu: Klapam. ‡ Elparolu: Tuting.

Mi volus scii, ĉu mi tiel bone sukcesos kun ŝia patrino.
(al JULINO) Julino, mia kerubo, venu en miajn brakojn
(Ĉirkaŭprenas ŝin).

KAROLO *eniras dekstre.*

KAR.—Malnobla knabino !

JUL.—Sinjoro Rivers !

KAR.—Kaj vi, sinjoro, vi estas fripono.

O'CAL.—Fripono, sinjoro ?

JUL.—Pro la ĉielo, Karolo, ĉu vi scias al kiu vi parolas ?

KAR.—Mi parolas al fraŭlino Banks, pri kiu mi pensis, ke ŝi estas unu el la plej bonaj el siaj samseksanoj, kaj jam mi vidas, ke ŝi estas sur. . . .

O'CAL.—Sur la brusto de ŝia *patro*.

KAR.—Ŝia patro ?

O'CAL.—Jes, sinjoro.

KAR.—Neeble !

O'CAL.—Ho, kompreneble, sinjoro, kvankam ĝis hodiaŭ vi kaj mi estis nekonatoj unu al la alia, vi konas mian historion pli bone, ol mi mem.

KAR.—Julino, ĉu ĉi tio estas vera ?

JUL.—Ĝi ja estas, Karolo. Vi vidas mian patron longatempe fremdiĝintan sed forte amatan.

KAR.—Kiel ? Vi mirigas min.

O'CAL.—Pro kio, sinjoro ? Ĉu pro tio, ke la fraŭlino konas sian patron ?

KAR.—Mi ne povis supozi, ke. . . .

O'CAL.—Sed vi aŭdas, sinjoro. Kaj nun, sinjoro, permesu, ke mi demandu, pro kio mi meritas la nomon fripono.

KAR.—Nu, sinjoro, mi konfesas, ke mi parolis tro abrupte.

O'CAL.—Abrupte, sinjoro ! Vi trudas vin al la sankta privateco de patro kaj lia infano. Vi interrompas la unuan dolĉan travibron, kiun mi sentis en la daŭro de dek longaj jaroj.

KAR.—Sed volu iom senkulpigi min pro mia senscieco.

O'CAL.—Via senscieco ! Mi kredis, sinjoro, ke vi estas Kembriĝa universitatano.

JUL.—Patro kara, ne koleru lin.

O'CAL.—Nu, infano mia, pro vi mi ne volas koleri. Sinjoro Rivers, kvankam vi ĵetis al mi tre insultan epiteton, mi montros al vi, ke en mia naturo ne ekzistas venĝemo. Mi kredas, sinjoro, ke vi amas mian filinon ?

KAR.—Pli ol la vivon.

O'CAL.—Kaj vi estus feliĉa, se vi ricevus mian aprobon ?

KAR.—Neesprimeble, sinjoro.

O'CAL.—Estu do feliĉa. Jen, sinjoro. (*li transdonas ŝin al KAROLO*).

KAR.—Ĉu povas esti ?

O'CAL.—Prenu ŝin, sinjoro, kaj la ĉielo benu vin ambaŭ.

KAR.—Mankas al mi vortoj, sinjoro, por esprimi. . . .

O'CAL., *al si mem.*—Nu, tio estas, kion mi nomas *grandanimeco*.

KAR.—Ha, Julino, kia feliĉo !

JUL.—Kaj, Karolo, mi supozas, ke jam ne malplaĉos al vi, se mi ĉirkaŭbrakos mian patron.

O'CAL.—Mia karega infano. (*Ŝi kuras al li maldekstrecentren. Li enbrakigas ŝin*).

SINO. MONTAGUE *eniras maldekstre*.

SINO. M.—Ĝi estas do vera ?

O'CAL., *al si mem.*—Sinjorino Montague ! Ho ! Mortigo ! (*SINO M. aliras*).

SINO M.—La monstro, tiamaniere min trompi !

JUL.—Kara Lidnjo, gratulu min ; permesu, ke mi konatigu vin al homo, kiu. . . .

SINO. M.—Vi povas ŝpari al vi la klopodon, Julino ; mi jam antaŭe konatiĝis kun tiu sinjoro.

JUL.—Efektive !

SINO. M.—Sed tio okazis antaŭ kelke da jaroj, kaj. . . .

O'CAL., *al si mem.*—Nun mi min trovas pli profunde en la koto ol iam antaŭe.

JUL.—Kaj ĉu vi ne volas diri bonvenon al li ? Faru tion, mi petegas vin pro mia patrino.

SINO. M.—Pro via patrino, efektive !

JUL., *flanken al* Karolo.—Karolo, kio povas esti la kaŭzo de ĉi tio ? Nepre io okazis !

KAR.—Mi opinias, ke pli bone estus lasi ilin solaj, kara. Pendiginda homo ! mi komencas senti ian dubon. Mi devas observi . . . (*Elkondukas JULINON malantaŭe-centre.*)

SINO. M.—Nu, doktoro Banks, ĉar oni informis min, ke tio estas via efektiva nomo, ŝajnas, ke vi estas edziĝinta, sinjoro, . . . edziĝinta !

O'CAL.—Mia karega Lidnjo !

SINO. M.—Lidnjo ? Kiel vi kuraĝas, sinjoro, alparoli min per tiu nomo ? Kiel vi maltimas alparoli aŭ eĉ rigardi min post via trompado ? —Edziĝinta !

O'CAL.—Nu, sed se vi konsentus aŭdi min . . .

SINO. M.—Ne eĉ unu vorton, sinjoro. Kredante, ke vi estas fraŭlo kaj honorinda homo, mi venis por diri al vi, ke mi estas preta, sinjoro, proponi al vi mian riĉon kune kun neŝanĝiginta amo. Sed ĉar mi jam nun scias . . .

O'CAL.—Jen uragano ! Mi certigas vin, ke vi trompiĝis, kaj se vi lasos min klarigi . . .

SINO. M.—Nu, sinjoro, kion vi havas, por klarigi ?

O'CAL.—Nu, do, mia anĝelo, unue, ke . . . (*Sonorilo laŭte sonas post la scenejo.*)

Enkuras JULINO, sekvata de RIVERS, maldekstre.

JUL.—Kara patro, la patrino ĵus alvenis.

O'CAL.—Ho ve !

SINO. M., *flanken al* O'CALLAGHAN.—Jen, sinjoro, kion vi jam havas por diri ?

RIV., *forrigardante maldekstren.*—Ĝi ja estas via edzino, doktoro, mi povas ŝin vidi.

SINO. M.—Malbonegulo, adiaŭ por ĉiam, (*Eliras tra pordo maldekstre-centre.* O'CALLAGHAN *paŝas tien kaj reen en la ĉambro. Ili sekvas lin.*)

O'CAL., *al si mem.*—Mil diabloj ! Jen malaperas hejmo kaj ĉiujara enspezo da dek mil spesmiloj.

RIV.—Mi povas interpreti ĉi tiun emocion. Via feliĉeco pro la alveno de via edzino estas tro forta, ĝi tropremas vin.

O'CAL.—Jes, sinjoro, ĝi sufiĉas por kaŭzi mian morton.

RIV.—Nu, do, anstataŭ tuj renkonti ŝin, permesu, ke mi delikate sciigu al ŝi la novaĵon, por ke vi ambaŭ havu tempon prepari vin.

O'CAL.—Multe pli bone, sinjoro, multe pli bone, ĉar se, kiel vi vidas, sinjoro, mi ne povas esprimi al vi tion, kion mi sentas, vi komprenas, ke . . .

RIV.—Ĝuste tiel.

O'CAL., *al si mem.*—Kion, pro la diablo, mi povus diri al ŝi?

RIV.—Nu, do, doktoro, se vi iom atendos, mi kaj Julino venos al vi, kiam ĉio estos preparita. Nun, kuraĝe, kara sinjoro, kuraĝe, ĉiuj viaj mizeroj baldaŭ finiĝos. (*Eliras kune kun JULINO malantaŭe-centre*).

O'CAL.—Kontraŭe, ili multobliĝas. Se mia anĝelo jam foriris de la domo ne aŭdinte mian klarigon, mi jam neniam plu ekvidos ŝin. Jen revenas mia konstanta malbona sorto, tiel certe, kiel mi estas pekulo. Tuj en la momento, kiam mi ekpensis, ke la ventego jam ĉesis, ke la vojo estas glata, kaj mia jungaĵo en bona ordo, elfalas fiksilo de rado kaj ankoraŭ unu fojon mi trovas min renversita.

KAROLO *eniras dekstre-centre*.

KAR.—Kiel, sinjoro? Mia onklino ĵus diris al mi, ke via nomo iam estis O'Callaghan.

O'CAL.—Nu, sinjoro, kaj kio do?

KAR.—Laŭ kia rajto do vi donis al mia patro la karteton de doktoro Banks?

O'CAL.—Laŭ la plej alta rajto. Ĝi estis la sola, kiun mi havis.

KAR.—Sed kvankam vi prenis lian nomon, sinjoro, vi havis nenian rajton ĉirkaŭbraki lian filinon tiel, kiel vi faris.

O'CAL.—Nenian rajton! Kvankam mi ne ŝin vidis en la daŭro de dek jaroj! Ĉu mi ne estis devigata montri amemon por subteni la iluzion?

KAR.—Sed vi ne estis devigata kisi ŝin, sinjoro.

O'CAL.—Kaj ĉu vi plendas pro tio? Mi ja kisis la knabinon nur por servi al vi. Jen via danko!

KAR.—Danko! Efektive! Nu, la afero jam finiĝis.

Prenante la nomon de doktoro Banks, vi ruinigis ĉion. Lia edzino ĵus alvenis. Ŝi nepre rekonos vin, kvankam Julino ne rekonis; sekve la rezultato estos, ke oni nin ambaŭ senmaskigos kaj forpelos el la domo.

JOHANO *enkuras de la ĝardeno centre.*

JOHANO.—Pardonu, sinjoro. Maljuna sinjoro falis de sur la Londona pasaĝera kaleŝego, tial mi diris, ke oni lin alportu al vi. (*Eliras*).

O'CAL.—Kio?

KAR.—Ha! ha! Jen, mia amiko, vi jam havas efektivan taskon. (*Eliras tra maldekstra pordo*).

O'CAL.—Nu, mi opinias, ke la afero nun atingis belan krizon. Jen estas viro, kiu bezonas ĥirurgon, kaj virino, kiu bezonas edzon. Mi demandas al mi, kiun el ili mi plej kredeble povas kontentigi? Kion fari? Mi vidas, ke nur unu afero estas farebla—kuri al la gastejo, skribi letereton al Lidnjo kaj klarigi ĉion. Tion mi ja faros, mi ne prokrastos eĉ unu momenton, mi kuros la tutan vojon, kaj . . . (*elirante malantaŭe*).

Eniras maldekstre-centre JOHANO kaj ROBIN *subtenante* DOKTORON BANKS.

O'CAL.—Doktoro Banks! Mirindege!

DRO. B.—Ĉu povas esti? Mia kunvojaĝanto! (*Oni metas lin sur seĝon*).

O'CAL.—Kio estas al vi, sinjoro? Ĉu via kolo estas rompita?

DRO. B.—Ne, dank' al ĉielo, estas nenia rompo.

O'CAL.—Ĉu vi estas tute certa pri tio? Ĉu vi estas tute certa, ke vi ne bezonas ĥirurgon?

DRO. B.—Tute certa.

O'CAL.—Estimata sinjoro, *tre* plaĉas al mi aŭdi tion. Johano, lasu nin. (*Servistoj eliras maldekstre-centre*). Nu, sinjoro, tial ke via teruro jam forpasis, eble nun mirigas vin trovi min ĉi tie?

DRO. B.—Efektive ĝi mirigas min, sed ne malpli plaĉas al mi, ĉar eble vi povas fari al mi la plej gravan servon.

O'CAL.—Efektive! Mi petas do, ke vi nomu ĝin sen hezito.

DRO. B.—Eble vi scias, ke en ĉi tiu domo sin trovas mia filino, kiu jam de multe da jaroj estas disigita for de mi.

O'CAL.—Jes, mi aŭdis pri tio.

DRO. B.—Mi venis en ĉi tiun landon por sciigi, ĉu ŝi konsentus reiri Francujon kun mi. Pri tio mi nur povas sciigi ĉe privata intervido, kiun eble vi povus aranĝi.

O'CAL.—Sed eble mi ne povus, sinjoro; ĉu intervido kun via *edzino* ne servus vian celon egale bone?

DRO. B.—Mia edzino! Ne, sinjoro; ŝi estas persono, kiun rigardi mi ne povas plu.

O'CAL.—Nu, sinjoro, kompreneble mi ne povas rifuzi vin helpi, sed ĉar estas necese, ke mi konsideru pri la rimedo, mi konsilas, ke vi eniru en tiun ĉambron (*montrante al ĉambro dekstre*).

DRO. B.—Tiun ĉambron?

O'CAL.—Tie neniu interrompos vin, kaj . . .

DRO. B.—Mi povas do apogi min sur via amikeco?

O'CAL.—Vi tion povas, sinjoro, kaj intertempe vi povas vin apogi sur tiu kamenbreto. (DOKTORO BANKS *eniras en ĉambron dekstre*.) Penso frapas min. Jen estas viro kaj virino, kiuj jam de dek jaroj estas disigitaj, sed jam disigas ilin nur distanco de dek paŝoj. Eble nur manko de klarigo tenis ilin apartaj la tutan tempon. Ĉu ne estas mia devo kunvenigi ilin, doni al ili la eblon konfesi sian malsaĝon? Ĝi certe estas. Sed mi pripensu. Kion fari, se, kiam ili kunvenos, mia filantropia deziro malsukcesos? Kion fari, se ili, kiel duo da ĥemiaj korpoj kies altira forto estas elĉerpita, aperigos repuŝemon? En tiu okazo mi ŝlosos la pordon ĝis ĉesos la fermentado, kaj poste mi penos produkti novan kombinaĵon.

RIVERS *eniras maldekstre-centre*.

RIV.—Ĝoju, doktoro, ĝoju! Mi plenumis mian taskon. Mi malkaŝis ĉion al via edzino, kaj ŝi atendas vin en feliĉegeco.

O'CAL.—Efektive?

RIV.—Nur estas necese, ke vi iru al ŝi, kaj. . .

O'CAL.—Nu, pripensinte, mi opinias ke ne, sinjoro.

RIV.—Ne? Mi esperas, ke vi ne ŝanceliĝas.

O'CAL.—Tute ne, sinjoro. Se vi estos tiel afabla venigi sinjorinon Banks, en tiu ĉambro ŝi trovos sian edzon.

RIV.—Neniam mi portis tiel ĝojan komunikon. (*Eliras tra pordo maldekstre-centre*).

O'CAL.—Nun, laŭ la lingvaĵo de la historio, mi antaŭvidas la proksimiĝon de eksplodo. En tiu ĉambro tuj okazos tiel bela batalo, kiel tiu inter la leono Nero kaj la hundo Bil. Kien mi loku min por ĝin vidi? Plej oportune post tiu kanapo. Ili venas. Unue mi devas prepari mian amikon. (*Malfermas la pordon dekstre, kaj parolas per mallarĝa voĉo*). Nun, sinjoro, preparu vin; la sinjorino venas. (*Retiras sin maldekstren malantaŭ kanapo*).

RIVERS *eniras centre, subtenante SINJORINON BANKS, kies kapo kuŝas sur lia ŝultro*).

RIV.—Nun, kuraĝe, kuraĝe, estimata sinjorino; post kelke da paŝoj vi trovos vin kun li. Memoru, ke vi renkontu lin sen ia dubo; li sopiras renkontiĝi kun vi, premi vin al sia brusto, kaj forigi ĉiujn malkompreniĝojn. (*ŝi iom hezitas, tiam eniras la ĉambrom dekstre. Li fermas la pordon kaj aŭskultas*). Nun, de kie mi povas vidi ilian kunvenon? Jen la fenestro, kiu malfermiĝas al la herbejeto—bonege! Mi iros tien, kaj vidos ĉion, kio okazos (*Eliras malantaŭe, dekstre-centre. O'CALLAGHAN iras el malantaŭ la kanapo maldekstre*).

O'CAL.—Ankoraŭ ĉio silentas. Kia paŭzo antaŭ batalo! Mi mortas de deziro aŭdi la unuan pafon.

GEDOKTOROJ BANKS *aŭdiĝas post la scenejo*.

DRO. BANKS.—Suzano!

SINO. BANKS.—Johano!

DRO. BANKS.—Perfidulino! Lasu min!

O'CAL.—Per mia animo, la afero komenciĝas; mi venis ĝustatempe. (*Turnas la ŝlosilon en la pordo. DRO. BANKS piedfrapas ĝin. SINO. BANKS akrekrias*).

DRO. B.—Malfermu la pordon, sinjoro; ellasu min!

O'CAL.—Ellasu vin! Mi ne volas, sinjoro; ĉu mi ne scias, ke vi estas frenezulo, al kiu oni ne povas fidi, kaj ĉu vi ne estas sufiĉe sendanĝera en la brakoj de via prizorganto?

DRO. B.—Malfermu la pordon, sinjoro, alie mi min turnos al la leĝo.

O'CAL.—La leĝo, sinjoro! Ĉu vi scias, kion diras la leĝo? Ĝi diras, ke vi vivu kun via edzino, kiel bona, bonorda homo, kaj ne lasu ŝin al ŝi mem kaj la diablo. Mi ĉi tie staras, sinjoro, kiel la enkorpiĝinta genio de la leĝo, kiel la voĉo de la senmorta Coke* kaj la fama Lyttleton,† kiuj pri tiu temo diras, ke, pro tio, ke via edzino estas kvazaŭ viaj propraj karno kaj ostoj, ŝi estas parto de via korpo, kaj, ke, detranĉi tiun parton estas krimo mortinda, kiun oni povas puni "*cum Ŝnuro suspendo.*"‡ (*Paŭzas kaj aŭskultas*). Tio kvietigis lin; li ne rapidos paroli denove pri la leĝo. Ili silentas—terure silentas! Penso frapas min. Kion fari, se tiu frenezulo premsufokis ŝin per la sonorila ŝnureto kaj forsavis sin supren el la kamentubo. Per mia animo, mi devas rigardi (*Metas seĝon sur la kanapon, suriras ĝin, kaj rigardas tra la superporda vitro*). Ĉio en ordo! Jen ŝi estas sur seĝo, balancante sin po dek mejloj en horo, kaj li, fiksita kiel la fatalo, aspektante preta formanĝi ŝin. Mi volus scii, kio venos el ĝi. De la fariĝo en la nuna minuto dependas mia sorto. Jen, li faras demandon, ŝi plorĝemas respondon. Tio estas la irado de informiĝado. Nun li komencas paŝi kaj ŝi komencas ploregi. Tio estas la irado de la naturo. Post tondro nepre sekvas pluvo. Nun ŝi komencas paroli, kaj li komencas senkoleriĝi. Tio estas bona signo. Ŝi faras demandon, kaj li devas respondi ĝin. Ankoraŭ pli bone! Ŝi povas nur plorĝemi, li devas trankviligi ŝin. Pluen, miaj karuloj! Li diras ion bonkoran. Ŝi aspektas ĝojege. Per la potenculoj! ĝi venas! Li etendas la brakojn, ŝi sin ĵetas en ilin. Hura! Ĉio finiĝas bonege! Per Jupitero! (*Svingas la poŝtukon*).

Eniras centre RIVERS, kiun sekvas KAROLO, JULINO kaj SINJORINO MONTAGUE.

RIV.—Kion mi vidas?

O'CAL.—La homan animon, sinjoro, en ĝia plej bela aspekto, ĝojantan pro la feliĉo de aliaj.

RIV.—Kiu do estas en tiu ĉambro kun sinjorino Banks?

O'CAL.—Kiu ĝi povus esti, se ne tiu, kiu havas tian rajton—ŝia edzo.

* Elparolu: Kok.

† Elparolu: Li't'lt'n.

‡ Ŝajnas, ke Sro. O'Callaghan en sia ekscito ne faras juston al la latina scio de la fama juristo.—Noto de la tradukinto.

RIV.—Ĉu do vi ne estas ŝia edzo ?

O'CAL.—Ne, sinjoro, mi nur estas lia amiko, kiu, tute same kiel vi, deziris fini lian mizeron.

RIV.—Sed, sed . . . kiel do li enigis sin tien ?

O'CAL.—Estimata sinjoro, ĉu estas grave, kiamaniere li enigis sin tien, se li havas rajton *resti* tie. (RIVERS iras al la pordo kaj ĝin malfermas).

RIV.—Jes, Julino, jen estas via patro ĉe la flanko de via patrino. (JULINO eniras en ĉambbron dekstre. Sekvas ŝin RIVERS kaj KAROLO).

O'CAL.—Mia karulino, kion vi jam diros ?

SINO. M.—Kion mi povas diri ?

O'CAL.—Ĉu mi estas tia monstro, kian vi ĵus prezentis al vi ?

SINO. M.—Vi certe estas monstro, antikva monstro, ĉar vi estas sfinkso, kiun kompreni estas neeble.

O'CAL.—Kaj malgraŭ tio, ke la neceso devigis min trompadi, ĉu vi volas rifuzi al mi la rimedon por ne plu trompi ?

SINO. M.—Ne, se mi estus certa pri via sincereco, sed ĉu mi devus fidi al vi ?

O'CAL.—Vi certe devus, karulino mia, ĉar neniu alia volas.

SINO. M.—Ĉu vi povas riproĉi min, ke mi dubas ?

O'CAL.—Tute ne ; sed vi devus sekvi la regulon de la leĝo, ke en duba okazo oni devas decidi favore por la juĝato. (*Ŝi donas al li la manon*).

Eniras dekstre DOKTORO BANKS, JULINO, SINO. BANKS, RIVERS kaj KAROLO.

DRO. B.—Sinjoro O'Callaghan, en mia nuna feliĉeco mi ne povas koleri vin pro via ruzo, sed mi petas, ke vi klarigu al mi, per kia rimedo vi . . .

O'CAL.—Estimata sinjoro, pro tio, ke mi estas tiel feliĉa rehavigi al vi la trankvilon, ne grava estas la rimedo. Klarigi nur konfuzus min, kaj, kaj. . . .

DRO. B.—Diru do, kian rekompencan mi povas doni al vi ?

O'CAL.—Nu, sinjoro, se vi tre deziras kvitiĝi kun mi, jen estas mia amiko, sinjoro Karolo Rivers, kiu estas korigita al ĉi tiu fraŭlino, kaj, ĉar vi ree havas vian edzinon, eble vi havus nenion kontraŭ disiĝo de filino.

DRO. B.—Tute ne, sinjoro, se sinjoro Rivers ne havas ion kontraŭ. . . .

RIV.—Mi? Tute ne. Mi deziras fari al vi unu demandon. (GEDOKTOROJ BANKS *sin turnas flanken kune kun KAROLO kaj JULINO*). Por venigi ĉi tien vian amikon, kiamaniere vi sukcesis enluli liajn suspektojn?

O'CAL.—Kiamaniere, sinjoro? Nu, vi konas mian magnetisman influon. (*Faras movojn per la manoj*).

RIV.—Ho, tiamaniere! Sufiĉe! (*Turnas sin flanken al la aliaj. KAROLO paŝas antaŭen*).

KAR.—Nu, amiko, malgraŭ ĉio, mi trovas vin bonegulo, sed mi tre deziras ekscii, kiamaniere vi sukcesis tiel bone trompi la maljunulinon?

O'CAL.—Kiamaniere? Nu, sammaniere kiel mi trompis vian patron. (*Faras movojn kaj signojn per la manoj*).

KAR.—Oho! Mi estas kontenta. (*Turnas sin al JULINO*).

O'CAL.—*turninte sin al la aŭdantaro*.—Sed mi ne estas kontenta, escepte se la eksperimentoj, kiujn mi faris ĉi tiun vesperon, plaĉis al aliaj, kaj la sorto, kiu jam fariĝis favora por mi, ankoraŭ pli favoros min, permesante, ke mi provu mian influon sur kelkaj el la belaj kaj bonvolaj gesinjoroj, kiujn mi vidas antaŭ mi. (*Faras movojn per la manoj al la aŭdantaro*).

Lokoj de la personoj ĉe la falo de la kurteno.

KAR., JUL., DRO. B., SINO. B., O'CAL., SINO. M., RIV.

FINO.

V. T. SUMFIELD,
ESPERANTISTO-PRESEJO,
EASTBOURNE,
ANGLUJO.